

Karlo Markso

**La tiel nomata
Fragmento pri maŝinoj**

Karlo Markso

**La tiel nomata
Fragmento pri
maŝinoj**

Monda Asembleo Socia (MAS)

Karlo Markso
La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj
Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano
Kun antaŭparolo de Ralph Dumain
Embres-et-Castelmaure
Monda Asembleo Socia (MAS)
2020
ISBN 978-2-36960-248-4

(= MAS-libro n-ro 256)

Tiu ĉi teksto estas parto de
Karl Marx: Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie
[Karlo Markso: Konturoj de la kritiko de la politika ekonomio],
Marx-Engels-Werke (MEW), vol. 42, p. 590 ĝis 605.

Enhavtabelo

Ralph Dumain: Antaŭparolo.....	6
Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo.....	9
Rimarkoj de la tradukinto.....	35
Karlo Markso: La tiel nomata fragmento pri maŝinoj.....	36
[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio].....	36
Citaĵo pri la cifereca evoluo.....	75
La Monda Asembleo Socia (MAS) kaj ĝiaj libroj.....	76

Ralph Dumain: Antaŭparolo

La *Grundrisse*¹ en la germana originalo unuafoje eldoniĝis en Sovetunio en 1939-41, poste en GDR² en 1953. Nacilingvaj tradukoj burĝonis en la 1960-aj kaj 1970-aj jaroj kaj novaj aperis post tiam (la anglalingva traduko aperis en 1973). En ĉi tiu verko oni trovis pli profundan kompreneblon de la metodiko de Markso kaj la daŭran influon de Hegelo. Diskonigo de la *Grundrisse* kontribuis al revoluciigo de marksisma teoriado en tuta gamo de studobjektoj, de valor-teorio ĝis Kulturaj Studoj.

El tiu finfine publikigita kajeraro oni tiris sekcion nun nomata ‘Fragmento pri maŝinoj’. Rimarku, ke la tiel nomita ‘fragmento’ komenciĝas per citaĵo el *Traktaĵo pri la ekonomio de maŝinoj kaj de fabrikado (On the Economy of Machinery and Manufactures, 1832)* de Charles Babbage. Ĉi tiu verko gravas laŭ tute kontraŭaj starpunktoj de Babbage kaj de Markso. Temas pri konceptado de fabrikejo kaj kiel centralizenda aŭtomato kaj pri la rolo de laboristoj en tia maŝinigita fabrikmedio, el la vidpunkto de kapitalisma produktado. La alproprigo de homaj kapabloj per tiu ‘aŭtomato’ kaj la ŝrumpigado de vivaj laboristoj ĝis meĥanikaj eroj en la produktprocezo ricevas lertan priskribon fare de Markso.

1 En Esperanto: *Konturoj*. La plena titolo: “Konturoj de la kritiko de la politika ekonomio”, el kiu “La fragmento pri maŝinoj” estas parto ĉi tie tradukita al Esperanto. -vl

2 GDR: Germana Demokratia Respubliko, kiu per sia parlamento en 1990 aliĝis al la Federacia Respubliko Germanujo. -vl

Ralph Dumain: Antaŭparolo

Enestas fundamenta kontraŭdiro: la eventuala funkcio de laboristoj proksimiĝas al nulo, afero kiu minacas la vivkapablon de la laboristaro, sed samtempe tiu procezo subfosas la vivkapablon de kapitalismo. Cetere, la potencialo de la apartigo de la laboristo for de tradicia laboro kaj la mastrumado de produktprocezoj pere de la ‘ĝenerala intelekto’ ebligis en socialisma sociordo lukson kaj liberecon. Markso detaligas sian perspektivon pri maŝinoj kadre de sia valorteorio, kaj multaj teoriistoj de la 1960-aj jaroj kaj poste disvolvis proprajn ellaboraĵojn el tiu starpunkto.

Aldone al tio, kion Markso lernis de Babbage, ŝlosila afero nepre konsiderendas: Babbage per sia invento de sia meĥanika ‘analiza maŝino’ (analytical engine) fariĝis la pioniro de la eventuala moderna elektronika komputilo. Multaj kaj en burĝaj kaj en marksismaj publikaĵoj nuntempe agnoskas la fragmenton pri maŝinoj de Markso kiel ĝerman analizon de sistemo kies logika evoluo rezultas en la fenomenoj de robotoj kaj artefarita inteligento en aktualaj kaj estontaj okupoj, industrioj kaj ekonomioj.

Konstruado de artefaritaj objektoj laŭ formoj kaj movoj de vivaj estaĵoj okazis en diversaj civilizacioj dum jarcentoj. En la 18-a jarcento aperis, konstruitaj por amuzo kaj varbado de aristokratoj, manpleno de komplekseĝaj meĥanikaj androidoj (homaŭtomatoj), ekz. virin-formaj androidoj kiuj ludis fortepianon eĉ kun korpaj kaj vizaĝaj movoj kiuj imitis realajn virinojn, kies propraj gestoj mem

Ralph Dumain: Antaŭparolo

jam estis nenaturaj kaj artefarite postulataj.³ Anksio pri la meĥanikigo de homoj en industria civilizacio kreskis dum la 19-a jarcento, en kiu aperis ankaŭ la fako kaj praktiko de ‘scienca mastrumado’ (Taylor-ismo), al kio aldoniĝis timoj pri senlaborigo sub kreskanta aŭtomatigo de industrioj en la 20-a. Eventuala nedistingebleco inter homoj kaj maŝinoj instigis maltrankvilon, kiu post la katastrofo de la unua mondmilito rezultis en la malutopia dramo *R.U.R. (Rossum’s Universal Robots)* de Karel Čapek en 1920, en kiu la termino ‘roboto’ (kiun inventis la frato de Karel, Jozefo, kiu pereis en nazia koncentrejo) unuafoje aperis. Ĉi-jare okazas la centjariĝo de *R.U.R.*, do jen taŭga okazo por soleni la kreaĵon de Čapek kaj alfronti la propagandon kaj minacon de artefarita inteligento per profunda analizo de ties rolo en la aktuala kapitalismo. Tiucele oni revenas al la pioniraj pensoj de Markso.⁴ La jena traduko fare de Vilhelmo Lutermano je mia peto helpas tiurilate en la esperantista medio.

La 17-an de aŭgusto 2020

3 Voskuhl, Adelheid. *Androids in the Enlightenment: Mechanics, Artisans, and Cultures of the Self* [Androidoj dum la Klerismo: meĥanikistoj, metiistoj, kaj kulturoj de la memo]. Chicago; London: The University of Chicago Press, 2013.

4 Engster, Frank; Moore, Phoebe. “The search for (artificial) intelligence, in capitalism” [La serĉo por (artefarita) inteligento, en kapitalismo], *Capital & Class*, vol-o 44, n-ro 2, junio 2020 (speciala numero: Machines and Measure [Maŝinoj kaj mezurado]), p. 201-218.

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

[...]

En 1850, baldaŭ post sia transloĝiĝo al Londono, Markso reprenis sian ekonomikan studadon interrompitan dum la revolucio de 1848/49 kaj per tio daŭrigis siajn sciencajn esplorojn de la kvardekaj jaroj. Li sisteme studis librojn, broŝurojn, pamfletojn, flugfoliojn kaj periodaĵojn, antaŭ ĉio verkojn de burĝaj ekonomikistoj kiel William Petty⁵ kaj François Quesnay⁶ ĝis la reprezentantoj de la klasika angla ekonomiko Adam Smith⁷ kaj David Ricardo⁸. Krom pri verkoj de multnombraj burĝaj ekonomikistoj kaj de utopiaj socialistoj li okupiĝis pri statistika materialo kaj pri anglaj

5 William Petty [*ŭiljəm pēti*] (1632 – 1687), angla statistikisto kaj ekonomikisto, unu el la antaŭuloj de la “klasika” ekonomiko. -mew

6 François Quesnay [*frasŭá kené*] (1694 – 1794), franca kuracisto kaj ekonomikisto, ĉefa figuro de la fiziokrata skolo. -mew

7 Adam Smith [*édem smís*] (1723 – 1790), angla ekonomikisto kaj filozofo. Li estas la aŭtoro, kiu donas al la klasika ekonomiko ĝian definitivan formon. Markso nomas lin la ekonomikisto de la manufaktur-periodo. Liaj teorioj pri la labordivido, pri produktiva laboro kaj pri la plusvaloro fariĝis tre gravaj. Laŭ lia teorio, la vera riĉaĵo de la nacioj ne estas la mono, kion asertis la merkantilistoj, sed la utila laboro, kreanto de interŝanĝvaloroj. Por li, ne nur la kampkultura laboro, kion asertis la fiziokratoj, sed ankaŭ la industria laboro kreas plusvaloron. „La kontraŭdiroj de A. Smith”, diras Markso, „estas ege interesaj, ĉar ili entenas problemojn, kiujn li, kvankam li ne solvas ilin, tamen montras per tio ke li kontraŭdiras sin.” -mew

8 David Ricardo [*dévit rikádo*] (1772 – 1823), angla ekonomikisto, la lasta granda reprezentanto de la klasika ekonomiko. -mew

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

parlamentaj dokumentoj, legis oficialajn raportojn de anglaj fabrikinspektistoj al la komuna ĉambro de la parlamento, tralaboris historian, tehnikan kaj natursciencan literaturon kaj ankaŭ interesiĝis pri la kulturhistorio, mondhistorio kaj samtempa historio. Londono, la tiutempe plej granda urbo de la mondo kaj metropolo de la plej evoluinta kapitalisma lando, donis por la studoj plej favorajn kondiĉojn. Markso mem rimarkigis pri tio:

“La monstre granda materialo por historio de la politika ekonomio⁹, kiu estas amasigita en la British Museum, la favora starpunkto, kiun Londono donas por la observado de la burĝa socio, fine la nova evolu-stadio, en kiu tiu lasta ŝajnis eniri kun la malkovro de la kalifornia kaj aŭstralia oro, igis min rekomenci tute ĉe la komenco kaj kritike tralabori la novan materialon.” (Vidu la volumon 13 de la MEW, p. 10s.)

Ĝis Julio de 1857 la laboro de Markso konsistis antaŭ ĉio en kolektado kaj kritika disponigo de la plej diversaj fontoj pri la ekonomia teorio kaj en rekta studado de ĉiuj gravaj okazaĵoj kaj faktoj de la kapitalisma ekonomia vivo en Anglujo kaj en aliaj landoj. Pri la amplekso de liaj esplor-laboroj en la kvindekaj jaroj atestas miloj da paĝoj da ekstraktoj. De 1850 ĝis 1857 li plenigis plurdekojn da

9 La nocio *politika ekonomio* en Esperanto nuntempe estas plej ofte anstataŭigata per *ekonomiko*. -vl

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

kajeroj per ekstraktoj kaj konspektoj, kiujn li parte numeris per romaj ciferoj kaj kiujn li en la sekvaj jaroj ĉe la ellaborado de sia teorio ĉiam denove uzis. Krome Markso en tiuj jaroj komencis uzi kelkajn kajerojn, en kiuj li kunigis la citaĵojn pri certaj temoj, ekz-e “La plene disvolvita monsystemo”, “esenco de mono, kredito, krizoj” kaj aldonis mallongajn komentojn. Tio estis unua prilaborado de la tuta materialo. Krome Markso verkis tre multajn gazetarajn artikolojn pri la tiam ekonomia politiko kaj pri la ekonomia vivo de la kapitalismaj landoj, kiuj entenis novajn sciencajn konkludojn el liaj teoriaj studaĵoj.

Apartan atenton Markso dediĉis en la kvindekaj jaroj al la ekonomia krizo en kelkaj eŭropaj landoj. Markso kaj Engelso en tiu kunteksto senpacience atendis la aperon de revolucia situacio.

“Ĉi-foje okazos dies irae [lasta juĝo] kiel neniam antaŭe, la tuta eŭropa industrio detruita, ĉiuj merkatoj superplenaj [...], ĉiuj posedantaj klasoj enŝlimiĝintaj, kompleta bankroto de la burĝaro, milito kaj malordo en plej alta grado. Ankaŭ mi kredas, ke ĉio ĉi plenumiĝos en la jaro 1857” (vidu la volumon 29 de la MEW, p. 78).

En letero de la 17-a de Novembro 1856 Engelso skribis al Markso:

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

“Tiom belan tabula rasa¹⁰ kiel ĉi-foje la revolucio ne facile retrovos. Ĉiuj socialistaj trompoj elĉerpitaj, la deviga dungo de laboristoj de 6 jaroj anticipita kaj rifuzita, nenia ebleco fari novajn eksperimentojn kaj frazojn. Sed aliflanke ankaŭ la malfacilaĵoj tute nudaj kaj senvualaj; la virbovo kaptendas rekte ĉe la kornoj” (vidu la volumon 29 de la MEW, p. 86).

Kiam en 1857, kiel de Markso antaŭdirite, la ekonomia krizo eksplodis, li kalkulis kiel sekvo pri nova revolucia impeto. Pro tio li konsideris sia devo tuj okupiĝi pri la rekta ellaborado de sia ekonomia teorio, por provizi la laboristojn kiom eble plej rapide per ekonomiaj konoj, fortigi ilian klaskonscion kaj helpi al ili kompreni la novajn historiajn taskojn. Al la laboristoj necesis prui la netransponteblo de la klasa antagonismo inter la proletaro kaj la burĝaro, de kontraŭeco, kiu necese kondukas al la proletara revolucio. Pro tio Markso en granda urĝo laboris por resumi la rezultojn de siaj ekonomiaj esploroj el la kvindekaj jaroj. “Mi laboras kvazaŭ freneze tra la noktoj por resumi miajn ekonomikajn studojn”, li skribis la 8-an de Decembro 1857 al Engelso, “por ke mi havu klare almenaŭ la konturojn antaŭ la diluvo.” (Vidu la volumon 29 de la MEW, p. 225.)

10 Nuligo de ĉio ĝis nun valida. -vl

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

Samtage Jenny Marx en sia letero al Conrad Schramm, amiko kaj kunbatalanto de Markso kaj Engelso, priskribis la okazadon de la marksa laborado jene: “Vi certe povas imagi, kiom bonhumora la Mohr¹¹ estas. Lia tuta antaŭa laborkapablo kaj facileco revenis kiel ankaŭ la freŝo kaj sireno de la menso [...], Karlo laboras tage por zorgi pri la ĉiutaga pano, nokte por fini sian ekonomikon.” Nun “tiu ĉi laboro fariĝis bezono de la tempo, naturneceso” (vidu la volumon 29 de la MEW, p. 645). En la aŭtuno de 1857 tiam ja eksplodis la ekonomia krizo, sed ĝi ne kondukis al tiom senpacience atendita revolucia situacio, sed ja estis la rekta instigo por Markso resumi siajn ekonomikajn studojn.

La plej grava rezulto, la krea ĝeneraligo kaj sistemigo de la materialoj kolektitaj en la kvardekaj kaj speciale en la kvindekaj jaroj estas la en 1857-1858 estiĝintaj tri ekonomikaj manuskriptoj, kiujn tiu ĉi volumo entenas.

[Pri “Bastiat¹² kaj Carey¹³”]

11 Iama familiara nomo por *nigrulo*, en la familio de Markso por Karlo. -vl

12 Frédéric Bastiat [*frederik bastjá*] (1801 – 1850) , franca ekonomikisto, liberkomercisto kaj granda malamiko de socialismo, predikis la harmonion de la klasaj interesoj en la kapitalisma socio; „la plej malprofunda kaj pro tio plej sukcesa reprezentanto de la vulgarekonomia apologio” (Markso). -mew

13 Henry Charles Carey [*hénri ĉálz kéri*], usona ekonomikisto, kontraŭis la rikardan teorion de la grundrento; komence li estis liberkomercista, poste defendis la dogansistemon. -mew

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

[Pri la “Enkonduko”]:¹⁴

La alia ne finita skizo, la “Enkonduko”, estis verkita fine de Aŭgusto 1857. Poste Markso rezignis pri ĝia publikigo, ĉar li ne volis anticipi “unue pruvendajn rezultojn” (vidu la volumon 13 de la MEW, p. 7). Ili estu la rezulto de la tuta esplorado. En la “Enkonduko” Markso pli amplekse ol ie aliloke formulis sian opinion pri la temo kaj la metodon de la politika ekonomio. Male al la burĝaj ekonomikistoj, kiuj metas en la antaŭon de la sceno la distribuadon, deklaras ĝin la veran temon de la politika ekonomio kaj konsideras la kapitalismon ne kiel historie pereontan ordon, Markso deiris el la antaŭrangeco de la socia produktado. La analizo de la dialektika interefikado de produktado, de distribuado, de interŝanĝo kaj konsumado kondukis lin al la konkludo, ke la produktado estas ne nur la deirpunkto, sed ankaŭ decida elemento de tiu unueco, ke la distribu-formoj estas nur alia esprimo de la produktadformoj. Markso ekkonis la produktadon kiel socie determinatan kaj faris ĝin objekto de sia esplorado.

En la “Enkonduko” Markso disvolvis la science ĝustan, la dialektikan-materiisman metodon de supreniro de la abstrakto al la konkreto, ĉe kio sub konkreto kompreniĝas la unueco de diverseco, la kunigo de multaj determinaĵoj kiel rezulto de la pensado en la procezo de tiu sintezo. Ĉe

14 Tiu *Enkonduko* aperis en Esperanto jene: Karlo Markso: Kontribuo al la kritiko de la politika ekonomio. Antaŭparolo kaj enkonduko (= MAS-libro n-ro 252), p. 13-55. -v1

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

tio Markso dediĉis apartan atenton al la problemo de la logika kaj historia alpaŝo al la esplorobjekto. Li montris la neceson de la logike sekvanta rigardo de la ekonomiaj kategorioj sub konsidero de ilia rolo en la donita ekonomia strukturo. Sed la ekonomiaj kategorioj aperas ne nur kiel nodopunktoj kaj rimedoj de la ekkono, sed ankaŭ kiel produkto de la historia evoluo de la socio; pro tio la logika analizo ne rajtas esti arbitra, pure pensa konstruaĵo, sendependa de la realaj procezoj. La sciencaj abstraktaĵoj de la marksa teorio estas nedisigeble ligitaj kun la konkreta realo, kaj la irado de la abstrakta pensado de la simpla al la komplika ĝenerale kongruas kun la reala historia procezo.

Deirante de sia opinio pri la objekto kaj la metodo de la politika ekonomio, Markso donis en la “Enkonduko” sian unuan malneton pri la strukturo de sia ekonomika verko, kiu ampleksas ĉiujn gravajn flankojn de la burĝa socio. Markso skribis:

“Fari la Enkondukon evidente tia, ke 1-e la ĝeneralaj abstraktaj determinaĵoj, kiuj pro tio pli aŭ malpli validas por ĉiuj sociaj formoj [...]. 2-e La kategorioj, kiuj konsistigas la internan strukturon de la burĝa socio kaj sur kiuj la fundamentaj klasoj baziĝas. Kapitalo, dunglaboro, grundproprietulo. Ilia interrilato. Urbo kaj kamparo. La tri grandaj sociaj klasoj. Interŝanĝo inter ili. Cirkulado. Kreditsistemo (privata). 3-e Resumo de la burĝa socio en la

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

formo de la ŝtato. Rigardata en rilato al ĝi mem. La ‘ne produktivaj’ klasoj. Impostoj. Ŝtatsuldo. Publika kredito. La loĝantaro. La kolonioj. Elmigrado. 4-e Internacia rilato de la produktado. Internacia labordivido. Internacia interŝanĝo. Eksporto kaj importoj. Ŝanĝokurzo. 5-e La mondmunkato kaj la krizoj.” (Vidu tiun ĉi volumon [MEW, vol. 42], p. 42.

[Pri “Konturoj de la kritiko de la politika ekonomio”:]

De Oktobro 1857 ĝis Majo 1858 Markso verkis manuskripton de pli ol 50 presfolioj. Ĝi estas konata sub la titolo “Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie” [“Konturoj de la kritiko de la politika ekonomio”] kaj estas la unua versio – la malneto – de lia ĉefverko *La kapitalo*.

Tiu ĉi manuskripto okupas apartan lokon en la estiĝ-historio de la marksismo. Kiam Markso en la kvardekaj kaj kvindekaj jaroj de la 19-a jarcento taskis sin profunde kaj ĉiuflanke esplori la ekonomion de la kapitalisma sociordo, li esploris la rimedojn, kategoriojn kaj metodojn same de la filozofio kiel ankaŭ de la politika ekonomio. Li okupiĝis diskute pri la ĝistiamaj filozofioj kaj ĉe tio disvolvis la marksisman filozofion. La “Konturoj” ankaŭ klare atestas pri tiu ĉi krea laboro. Ili apartenas al la klasikaj verkoj de la marksisma mondkoncepto kaj montras grandan riĉecon de ekonomikaj kaj filozofiaj demandoj kaj

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

respondoj. Markso per la “Konturoj” liveris gigantan teorian laboron por malkovro de la evoluleĝo de la moderna kapitalisma socio. Ĉi tie Markso por la unua fojo ellaboris en konturaj trajtoj kaj esencaj detaloj sian valorteorion kaj sur ties bazo la plusvalor-teorion, tiun “fundamentan pilieron de la ekonomia teorio de Markso” (vidu W. I. Lenin, Werke, vol. 19, p.6). La materiisma histori-koncepto kaj la plusvalor-teorio, jen la du grandaj malkovroj, per kiuj, kiel Engelso diris, la socialismo el utopio fariĝis scienco (vidu la volumon 19 de la MEW, p. 209 [kaj, en Esperanto, Frederiko Engelso: La evoluo de la socialismo de utopio al scienco = MAS-libro n-ro 74, p. 7 -v1])

Kiam Markso komencis verki pri la “Konturoj”, li havis ja tutan klaran ideon pri la kerna punkto de la politika ekonomio, la problemo de la plusvaloro, sed dum la laboroj trudiĝis novaj, ne antaŭviditaj detaloj, kiuj estis klarigendaj. Pro tio la skribado de la manuskripto ne signifas nur fiksadon de io antaŭe trapensita, sed dum la laboro Markso akiris konkludojn, kiuj estis malkovroj ne nur konsidere la tiaman staton de la politika ekonomio; liaj propraj ekonomiaj opinioj riĉiĝis. Samtempe la manuskripto vidigas la esplormetodon de Markso. Klare videbliĝas la diversaj laborŝtupoj, en kiuj la teorio estis detale plu disvolvata, kaj eblas paŝon post paŝo laŭspuri la procezon, en kiu li kreis la fundamentajn elementojn de sia ekonomia teorio. Ekz-e multaj formuloj de Markso en la

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

plua laborado estas rimarkitaj kiel nesufiĉaj kaj pro tio precizigataj. Tre ofte problemoj estas nur aludita kaj ĝia solvo prokrastita al posta okazo. Dum en la postaj malnetoj de lia ĉefverko antaŭregas la sistema prezentado de jam maturiĝintaj partoj de lia ekonomia teorio, en la manuskripto de 1857-1858 la vojo rekte sekveblas, kiu kondukis Markson al liaj grandaj malkovroj en la politika ekonomio.

Gravas ankaŭ en tiu ĉi kunteksto emfazi, kiom forte Markso dum tiu laborado estis subtenata de Engelso. Ne malofte ĉe la analizo de problemoj, kiuj radikis en la kapitalisma ekonomia praktiko, sed en la faka literaturo restis senrespondaj, li bezonis la faksciajn konsilojn de Engelso. La korespondado inter ili el tiu tempo tre klare atestas pri tio.

Markso komencis la “Konturojn” per kritiko de la ekonomikaj konceptoj de la prudonisto Alfred Darimon, antaŭ ĉio de la prudonisma monteorio. La kritikon de la prudonismo Markso konsideris grava takso de la scienca socialismo. Li skribis en 1880 en enkonduko al represo de sia verko “La mizero de la filozofio”, ke estis necese, “por trarabati la vojon al la kritika kaj materiisma socialismo, kiu volas klarigi la realan, historian evoluon de la socia produktado, bruske rompi kun tiu ideologio en la ekonomiko, kies lasta enkorpiĝo senscie estis Prudono¹⁵”.

15 Prudono (*Pierre Joseph Proudhon* [pjér ĵozéf prudón] (1809 – 1865) Etburĝa franca socialisto; unu el la teoriaj fondintoj de

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

(Vidu la volumon 19 de la MEW, p. 229 [en Esperanto: Karlo Markso: La mizero de la filozofio (MAS-libro n-ro 17)].

La unuan detalan kritikon de la etburĝaj opinioj de Prudono Markso donis jam en 1847 en “La mizero de la filozofio”, sed tiam li grandparte apogis sin sur la ekonomika teorio de Rikardo. En la manuskripto de 1857/1858 Markso daŭrigis la kritikon de la prudonismo el la pozicio de la jam grandparte maturiĝinta teorio. Li refutis la tezon de la prudonistoj, ke reformo de la bankoj, la eldonado de tiel nomata “labormono” aŭ de “horslipo”, estas efika rimedo por forigi la mizeron kaj la ekspluatadon de la laborantaj amasoj. Li klarigis, ke la antagonisma karaktero de la kontraŭecoj en la kapitalisma socio “neniam rompeblas per silenta metamorfozo”, ke la propono de la prudonistoj forigi unuopajn “mankojn” de la kapitalisma socio estas utopio, kiu misorientas la laboristan klason kaj deturnas ĝin de la plenumado de ĝia historia misio.

En la kritiko pri la prudonismaj opinioj Markso en la “Konturoj” ellaboris la fundamentojn de sia valorteorio,

anarĥiismo. Prudono „nebuligas la ekonomiajn kategoriojn, transformante ilin en eternajn ideojn, por denove alveni, post tiu ĉirkaŭvojo, al la burĝa ekonomio”. „Kiel li neniam sciis, kio estas la vera scienca dialektiko, li ĉiam restis nur sofisto”. (Markso). La teorioj de Prudono, refutitaj de Markso en sia verko „Mizero de la filozofio” (1847), havis grandan influon en Francujo dum longa tempo, kaj la anarĥiistoj daŭre aliĝas al ili. -mew – [Vidu Karlo Markso: La mizero de la filozofio. Respondo al Prudono: „La filozofio de la mizero” (MAS-libro n-ro 17). -v]

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

inkluzive de la duobla karaktero de la laboro kaj de la transformado de varo en monon.

Markso ne hazarde komencis la prezentadon de sia valorteorio per la kritiko de la prudonisma monteorio. En tiu ĉi procedo montriĝas esenca trajto de la marksa esplormetodo. Efektive la mono estas aparte stampanta aperformo de la varvaloro, ĉar la mono, la monformo de la valoro, estas la plej disvolvita, al la kapitalismo adekvata formo de la valoro. Laŭ tio la monteorio estas la rekta sekvo de la valorteorio. Markso povis atingi tiun ekkonon, ĉar en sia kritiko de la burĝa politika ekonomio same kiel ankaŭ en la tuta esplorado, kio por Markso estis unueca procezo, li avancis de la ekstera aperformo al la interna esenco.

La tezo de la duobla karaktero de la laboro en la kapitalisma varproduktado, kiu unuafoje estis ellaborita en la “Konturoj”, estas elstara rezulto de la marksa pensado. Ĝi konsistigas la fundamenton de lia valorteorio, kaj antaŭ ĉio per tio ĝi distingas sin de la laborvalorteorio de la klasikuloj de la burĝa politika ekonomio. Ili ne komprenis la kontraŭecon inter konkreta kaj abstrakta laboro en la burĝa socio kaj limigis sin al la simpla determinado de la valorgrando per la labortempo. Kontraste al tio, Markso emfazis, ke sur la ekkono de la duobla karaktero de la laboro baziĝas “ĉia kompreno de la faktoj” (vidu la vol. 31 de la MEW, p. 326).

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

El la duobla karaktero de la laboro, el tio, ke la laboro sub la kondiĉoj de la privata proprieto je la produktadrimedoj estas senpere privata laboro, dum ĝia socia karaktero devas ankoraŭ pruviĝi sur la merkato, sekvas la kontraŭeco inter uzvaloro kaj valoro de la varo, la kontraŭeco, kiu trovas sian eksteran moviĝformon en la duobliĝo de la varo en varon kaj monon, en tio, ke la varvaloro atingas memstaran ekziston en aparta varo, la mono. Per tio, ke la mono ekstere solvas la kontraŭecon inter la uzvaloro kaj valoro de la varo, ĝi samtempe akriĝas ĉiujn kontraŭecojn de la varproduktado baziĝanta sur la privata interŝanĝo kaj metas la kapitalismon neeviteble antaŭ ekonomiajn krizojn.

Dum la ellaborado de sia valorteorio en la “Konturoj” Markso atingis ĝis la malkovro de la varo kiel ekonomia ĉelformo de la kapitalismo. Sed tio signifis, ke la deirpunkto por la analizo de la ekonomia strukturo de la socio ne, kiel Rikardo supozis, povas esti la valoro kaj ankaŭ ne la valorrilato de la varoj, sed pli ĝuste la varo mem, la materia portanto de tiu rilato.

Ĉe la rigardado de la kategorioj varo kaj mono Markso analizis la por la burĝa socio karakterizan aĵigon¹⁶ de la sociaj interrilatoj, la servistigon de la individuoj, kiuj estas

16 En la originalo: *Versachlichung*: aĵigo, konkretiĝo, objektiviĝo; en aliaj kunteksto Markso poste plej ofte uzis anstataŭe la terminon *varigo*. -vl

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

regataj de siaj ekonomiaj rilatoj, el kiuj ili povas liberigi sin nur sur revolucia vojo.

Unu el la plej gravaj esplorrezultoj de Markso en la “ĉapitro pri la mono” estas la konstato, ke la evoluinta formo de la varproduktado sub la kondiĉoj de la privata proprieto je la produktadrimedoj necese premisas la transformadon de mono en kapitalon. La evoluo de la varproduktado kaj de la interŝanĝvaloro neeviteble kondukas al la “disigo de laboro kaj proprieto; tiel ke laboro = kreas fremdan proprieton kaj proprieto komandos fremdan laboron”.

En la “ĉapitro pri la kapitalo” Markso solvis la centran problemon de sia esplorado – la esploron de la esenco kaj de la meĥanismo de la kapitalisma ekspluatado.

La burĝaj ekonomikistoj vane klopodis por transiri de la valoro rekte al la kapitalo. Ili konsideris la kapitalon kiel simplan sumon de valoroj kaj ne komprenis la esencon de la transformiĝo de mono en kapitalon. Markso konstatis, “ke la simpla moviĝo de la interŝanĝvaloroj, tia kia ĝi ekzistas en la pura cirkulado, neniam povas realigi kapitalon”.

La esenco de la kapitalismaj produktadrilatoj estas determinata de la rilato inter dunglaboristo kaj kapitalisto, inter laboro kaj kapitalo, kiuj staras fronte unu al la alia kaj inter kiuj okazas interŝanĝo. La malfacilo de la analizo de tiu interrilato estas pruvi, ke la interŝanĝo inter

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

dunglaboristo kaj kapitalisto okazas sur la bazo de la valorleĝo, t.e. sur la bazo de la interŝanĝo de ekvivalentoj.

La analizo de Markso en la “ĉapitro pri la kapitalo” esence baziĝas sur la duobla karaktero de la varo esplorita en la “ĉapitro pri la mono”, sur la rigardo de la varo kiel unueco de kontraŭecoj: de uzvaloro kaj valoro¹⁷.

En la interŝanĝo inter kapitalo kaj laboro Markso distingas du kvalite diversajn procezojn: 1-a la veran interŝanĝon inter laboristoj kaj kapitalisto, en kies rezulto la kapitalisto interŝanĝas la produktadforton, “kiu konservas kaj multobligas”, 2-e la laborprocezon mem, en kiu tiu ĉi konservado kaj multobligado de la kapitalo okazas. Ĉe la analizo de la unua procezo Markso formulis la sekvan ekkonon: En la rilato de kapitalo kaj laboro “la unua flanko (la kapitalo) [...] estas al la alia flanko kiel interŝanĝvaloro kaj la alia (la laboro) al la kapitalo estas kiel uzvaloro”. Markso ĉi tie faris gravan paŝon por transiri de la kutima formo de la burĝaj ekonomikistoj de la “varo laboro” kaj de la “vendo de la laboro” al la varo laborforto. La laboro en tiu ĉi rigardo de Markso jam ne aperas kiel varo, sed kiel uzvaloro de tiu varo, kiun la laboristo vendas al la kapitalisto. La aparteco de tiu ĉi uzvaloro konsistas en tio, ke ĝi “ne estas materiigita en produkto”, tute ne ekzistas ekster la laboristo, “do ne reale, sed nur kiel ebleco, kiel lia kapablo”.

17 *Valoro*, kontraste al *uzvaloro*, ĉe Markso signifas la interŝanĝvaloron. -vl

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

En la unua procezo de la interŝanĝo inter laboro kaj kapitalo ankaŭ la disponpovo pri la vivanta laboro de la laboristo, t.e. lia laborforto, lia laborkapablo, transiris al la kapitalisto. La dua procezo de tiu interŝanĝo estas la laborprocezo mem, kiu koincidas kun la procezo de konservado kaj multobligado de la kapitalo.

Markso pruvis, ke la laboristo, kiu ne estas proprietulo de la produktadrimedoj, ankaŭ ne povas esti proprietulo de la produktoj de sia laboro, de tiu valoro, kiun li en la produktadprocezo produktas. Sed certan, antaŭe fiksitan parton de tiu valoro produktita de la laboristo kaj apartenanta al la kapitalisto la kapitalisto devas redoni al la laboristo en formo de salajro, por pagi la valoron de la laborforto, t.e. tiun laborkvanton, kiun la laboristo konsumas por sia “produktiĝo” mem. La laboristo kreas pli grandan valoron ol la valoron de sia laborforto, kaj la kapitalisto ricevas plusvaloron, kiu estas tiom granda kiom la diferenco inter la valoro kreita de la vivanta laboro kaj la valoro de la laborforto.

En la “Konturoj” Markso unuafoje stampis la nociojn konstanta kapitalo kaj varia kapitalo kaj klarigis ilian interrilaton. La distingo de tiuj du konsistaj partoj de la kapitalo estas tre grava por la politika ekonomio de la laborista klaso, ĉar ĝi montras, ke la profito en la produktadprocezo estiĝas ne per la tuta kapitalo, sed nur per tiu parto, kiu estas pagata por la laborforto. La valoro de la

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

konstanta kapitalo en la produktadprocezo ne kreskas, sed estas nur transdonata al la produkto.

La klasika burĝa politika ekonomio neniam esploris la plusvaloron pure kiel tian, sed nur en ĝiaj apartaj formoj kiel profito, interezo kaj rento, kiuj efikas ĉe la surfaco de la burĝa socio. La esplorado de la plusvaloro sendepende de ĝiaj apartaj formoj estas unu el la plej gravaj atingoj de la marka ekonomia teorio.

En la “ĉapitro pri la kapitalo” Markso disvolvis unuafoje en ĝeneralaj trajtoj sian teorion pri la du specoj de la plusvaloro, la absoluta kaj la relativa plusvaloro. En tiu kunteksto li malkovris la duoblan tendencon de la kapitalo: plilongigo de la labortago kiel rimedo por pligrandigi la absolutan plusvaloron kaj mallongigo de la necesa labortempo per altigo de la laborproduktivo kiel rimedo por pligrandigi la relativan plusvaloron.

Tiel Markso en tiu ĉi manuskripto unuafoje en la historio de la ekonomia scienco prezentis la meĥanisman de la kapitalisma ekspluatado. Li montris, ke la alproprigo, fare de la kapitalisma klaso, de la plusvaloro kreita de la laboristoj, estas la fundamento de la kapitalisma produktadprocezo. Ĝi okazas kongrue kun la leĝoj ennaskitaj en la kapitalista klaso, precipe kun la plusvalor-leĝo. La plusvaloro aperas en la marka teorio kiel necesa rezulto de la kapitalisma produktadrilatoj, ĝia produktado kaj alproprigo estas la esenco de tiuj rilatoj, la ĉefa celo de la kapita-

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

listoj, ĝi determinas la ceterajn kategoriojn kaj rilatojn de la burĝa socio, ĝi estas la bazo de la moviĝ-leĝo de la kapitalisma produktadmaniero kaj neeviteble kondiĉas ties pereon kaj anstataŭon fare de la komunismo. Se la kapitalisma ekspluatado, kiel Markso pruvis, estiĝas el la esenco de la kapitalismaj produktadrilatoj, tiam el tio sekvas, ke ene de la kapitalisma sociordo la laborista klaso ne povas esti liberigata el sia ekspluatigo. Samtempe kun tio, kiel Markso montris, ene de la burĝa socio mem kreiĝas la materiaj antaŭkondiĉoj por la neniigo de la kapitalisma produktadmaniero, “produktiĝas same interrilataj kiel produktad-rilatoj, kiuj estas same multaj minoj por ilin eksplodigi”.

Markso en la “Konturoj” ankaŭ jam komencis, surbaze de sia plusvalor-teorio, klarigi la aperformojn de la plusvaloro. Li disvolvis unuajn ideojn por la malkovro de la leĝo de la mezuma profito kaj de la difino de la produktoprezo, do por klarigi la kontraŭecan meĥanisman de prez-estiĝo sub la kondiĉoj de la kapitalismo. Markso konstatis, ke la profito de la tuta kapitalista klaso ne povas esti pli granda ol la sumo de la tuta plusvaloro kaj per tio atingis la konkludon, ke la profitkvotoj necese malsamaj en la diversaj produktadbranĉoj rezulte de la konkurenco inter la produktadbranĉoj kompenziĝas al ĝenerala profitkvoto. La estiĝo de ĝenerala profitkvoto okazas, kiel Markso prezentas, per la alidistribuo de la en ĉiuj branĉoj de la

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

kapitalisma produktado produktita ĉioma sumo¹⁸ de la plusvaloro laŭ la grandeco de la kapitalo investita en iu branĉo. Ĉe tio la varoj estas vendataj je produktadprezo, kiu devias de ilia valoro. Ĝi povas esti pli alta en kelkaj branĉoj kaj en aliaj branĉoj pli malalta ol la valoro.

Dum la laboro pri la “ĉapitro pri la kapitalo” Markso kompletigis la analizon de la kapitalisma produktadmaniero per la esplorado de la antaŭaj sociformoj kaj direktis sian rigardon al la estonteco, al tiu sociordo, kiu necese anstataŭos la kapitalismon. Li skribis: Nia metodo montras “la punktojn, kie la historia rigardo devas eniri aŭ kie la burĝa ekonomio kiel nur historia formo de la produktadprocezo montras trans sin al pli fruaj historiaj manieroj de produktado [...]. Same tiu ĉi ĝusta rigardo aliflanke kondukas al punktoj, ĉe kiuj la aŭfhebo¹⁹ de la nuna formo de la produktadrilatoj – kaj tiel antaŭzupo de la estonteco, estiĝanta movado skiziĝas. Se unuflanke la antaŭburĝaj fazoj aperas kiel *nur historiaj*, do aŭfhebitaj premisoj, tiam la nunaj kondiĉoj de la produktado aperas kiel *sin mem aŭfhebantaj* kaj pro tio kiel *historiaj premisoj* por tiuj, kiuj metas novan socian staton” (vidu vol. 14 de MEW, p. 9).

18 Ĉioma sumo signifas la sumon (de plusvaloro) produktita en ĉiuj branĉoj de la ekonomio. -vl

19 *Aŭfhebi*, *aŭfhebo* estas hegela nocio, de la germana vorto *aufheben*, kiu signifas samtempe nuligi kaj konservi. laŭ la kunteksto. Hegelo, la hegeloj kaj en ilia sekvo Markso kaj Engelso, uzis tiun terminon en la senco de “nuligo kaj samtempe konservado en nova paŝo sur pli alta nivelo”. -vl

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

En la “Konturoj” Markso karakterizis ankaŭ la nocion produktadmaniero, ĉe kio li indikis la aktivan rolon de la produktadfortoj en la procezo de la socia evoluo, kiuj neeviteble estigas la anstataŭon de socia formacio fare de la respektive pli alta.

Kuntekste kun la esplorado de la evoluo de la antaŭkapitalismaj proprietformoj Markso klarigis la procezon de la origina akumulado de la kapitalo kaj montris, ke ĝia esenco konsistas unuflanke en la elformiĝo de la klaso de dunglaboristoj, kiuj ne posedas produktadrimedojn, kaj aliflanke en la transformado de la produktadrimedoj en kapitalon, liberigitan el tradiciaj feŭdaj kaj korporaciaj malhelpoj. Por la unua fojo la epoko de la origina akumulado estis ĉi tie difinita kiel speciala transira periodo de la historia evoluo.

En la “Konturoj” Markso profundigis la bazojn de la scienca periodigo de la historio de la kapitalisma sociordo, kiun li en la kvardekaj jaroj jam indikis. Li argumentis por la neceso distingi en la evoluo de la kapitalismo inter la manufaktura kaj la maŝina stadio. La manufakturo ankoraŭ ne estigas la materian bazon por la ĝenerala disvastiĝo de la kapitalismaj rilatoj kaj por la forpuŝado de ŝtatkapitalismaj formacioj. Nur la maŝina grandproduktado estas la materia bazo por la definitiva elformiĝo de la kapitalisma sistemo, nur ĝi estas adekvata al la kompleta regado de la kapitalo.

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

Kun la esplorado de la estiĝo de la kapitalismo kaj de la malkovro de la leĝoj de ĝia estiĝo kaj evoluo Markso determinis la realan historian lokon de la kapitalismo kaj pruvis ĝian neeviteblan pereon, la neeviteblan aŭfhebon²⁰ de la disigo inter laboro kaj proprieto, propra al la kapitalismo. “Por ke la laboro ree konduku al siaj objektivaj kondiĉoj kiel ĝia proprieto, alia sistemo devas paŝi en la lokon de la sistemo de la privata interŝanĝo”. La de Markso ĉi-kuntekste donita analizo de la nova sociordo paŝanta en la lokon de la kapitalismo meritas apartan intereson.

En la manuskripto de 1857/1858 Markso nomas la komunisman socion tia socio, kie regas “libera individu-eco, bazita sur la universala evoluo de la individuoj kaj sur la subordiĝo de ĝia komuna, socia produktivo, kiel de sia socia riĉaĵo”. (Vidu MEW 42, p. 91.) Markso emfazas la historian neceson de la transiro al la komunisma socio, kies estiĝo premias certan ŝtupon de evoluo de la materiaj kaj spiritaj kondiĉoj.

La laboro en la estonta komunisma socio estas de Markso karakterizata kiel rekta socia laboro. Sub la kondiĉoj de la komuna produktado la laboro de la unuopulo ekde la komenco elpaŝas kiel laboro socia. Ne la interŝanĝo donas al la laboro la karakteron de ĝeneraleco, sed la socia proprieto je la produktadrimedoj kaj la komuna karaktero de la produktado dekomence faras la produkton de la laboro socia, ĝenerala.

20 Vidu pn 15. -vl

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

En tiu ĉi kunteksto havas aparte grandan gravecon la de Markso formulita leĝo de la ekonomio de la tempo sub la kondiĉoj de la komunisma socio. Markso skribas:

“Kun la premiso de komuna produktado, la tempo-determinado kompreneble restas esenca. Ju malpli da tempo la socio bezonas por produkti tritikon, brutaron ktp, des pli da tempo ĝi gajnas por alia produktado, ĉu materia aŭ spirita. Same kiel ĉe unuopa individuo la ĉiuflankeco de ĝia evoluo, de ĝia ĝuado kaj de ĝia agado dependas de la tempa okupiĝo. Ekonomio de tempo, al tio ĉia ekonomio fine reduktiĝas. Same la socio devas laŭcele ordigi sian tempon por atingi produktadon laŭ siaj ĉiomaj bezonoj; same kiel la unuopulo devas ĝuste dividi sian tempon por akiri konojn en laŭmezuraj proporcioj aŭ por kontentigi la diversajn postulojn je lia agado. Ekonomio de la tempo same kiel laŭplana dispartigo de la labortempo al la diversaj branĉoj de la produktado do restas unua ekonomia leĝo surbaze de la komuna produktado. Ĝi eĉ faras leĝon en multe pli alta grado.” (MEW 42, p. 105.)

Ĉia vera ekonomio esprimas sin en la ŝparado de labortempo, en la reduktado de la produktadkostoj al ebla minimumo; per aliaj vortoj, en la altigo de la laborpro-

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

duktivo. Tio identas kun la disvolvado de la produktadfortoj. Ŝparado de labortempo signifas plivastigon de la libertempo, kiu siavice reefikas al la produktivo de la laboro. La libertempo – kiel tempo de nenifarado, tempo por kleriĝo, por artista agado ktp – permesas al ĉiu membro de la socio la kompletan disvolvadon de siaj spiritaĵoj kaj korpaj kapabloj.²¹

Malsame ol kelkaj utopiaj socialistoj, kiuj revis pri tio, ke la laboro en la komunismo transformiĝos el malamata ŝarĝo, el malbeno, kiu ĝi en la kapitalismo estas por la grandega plimulto de la laboruloj, en ludon, en nuran amuziĝon, Markso parolas pri la ĝeneraleco de la laboro en la komunisma socio, pri la laboro kiel unua vivbezono, kiel la “damnita seriozo” (vidu MEW 42, p. 512). La komunisma laboro havas sciencajn karakterojn, ĝi estas la praktika aplikado de la scio, la “eksperimenta scienco, materie krea kaj konkretiĝanta scienco” (vidu vol. 42, p. 607)²². La scienco transformiĝas en rektan produktadforton. (Vidu MEW 42, p. 602)²³

Kiam Markso disvolvis sian ekonomian teorion, li samtempe ellaboris ankaŭ la strukturon de sia ekonomika verko. Jam estis menciita la unua plan-malneto, kiun Markso faris en Aŭgusto de 1857 en la ne finita “Enkon-

21 Vidu pri tio la polemikan verkon Paŭlo Lafargo: La rajtoj de la pigro (MAS-libro n-ro 251). vidu ankaŭ la citaĵon el la gazeto *Tagesspiegel* pri la cifereca evoluo, p. 74. -vl

22 Ĉi tie p. 54. -vl

23 Ĉi tie p. 46. -vl

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

duko”. Laŭ tiu plano, kiun Markso preskaŭ samforme ripetis fine de la “ĉapitro pri la mono” (vidu MEW 42, p. 154), la verko konsistu el kvin partoj, el kiuj la unua parto entenu la ĝenerale abstraktajn difinojn, kiuj en iu aŭ alia formo estas komunaj al ĉiuj sociordoj.

En Novembro de 1857 Markso komence de la “ĉapitro pri la kapitalo” (vidu MEW 42, p. 188) donis jam multe pli detalajn versiojn de la plano por tiu parto de sia laboro, kies rekta temo estas la kapitalo en ĉiuj ĝiaj formoj kaj aspektoj, ĉe kio en la sekcio “Ĝeneralaĵo” (kiun Markso poste nomis “La kapitalo ĝenerale”) faris tripartigon de la materialo, kiu poste en la strukturo de lia “Kapitalo” ludis tiom grandan rolon.

Per tiu ĉi manuskripto “Konturoj de la kritiko de la politika ekonomio” Markso resumis la rezultojn de siaj ekonomiaj studoj. Ĝi ne estis verkita unuavice por publikigado, sed servis al Markso por memkompreniĝo. En la diskuto kun la burĝa kaj etburĝa ideologio li disvolvis gravajn fundamentajn ideojn de sia ekonomia teorio. Per siaj ampleksaj studoj Markso povis malkovri la meĥanisman de la kapitalisma ekspluatado kaj tiel fari gravan paŝon al la ampleksa ekonomia argumentado de la historia misio de la laborista klaso.

Kun la finpretigo de tiu ĉi manuskripto finiĝis la unua granda etapo ĉe la ellaborado de la ekonomia teorio de

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

Markso kaj de la elformado de la strukturo de lia estonta ĉefverko “La kapitalo”.

Per la apero de la Marx-Engels-Gesamtausgabe (MEGA), kiu estas eldonata komune de la Instituto pri Marksismo-Leninismo ĉe la CK de la KPSU kaj de la Instituto pri Marksismo-Leninismo ĉe la CK de la SED, eblas kompletigi tiun ĉi eldonon de Marx-Engels-Werke (MEW) surbaze de la MEGA per kromaj kompletigaj volumoj.

En tiu ĉi volumo en la teksta parto, en la antaŭparolo kaj en la scienca aparato aperas la novaj esplorzultoj de la volumo 1 de la Dua Sekcio de la MEGA kaj de la volumo 46 de la dua rusa eldono de la verkoj de Markso kaj Engelso.

La teksto sekvas la senŝanĝan redonon de la marka manuskripto en la MEGA. Evidentaj skriberaroj estas korektitaj sen indiko, ĉiuj sencoŝanĝaj tekstaj intervenoj estas indikitaj en piednotoj. Por pli bona kompreno de la teksto la redaktejo en kelkaj lokoj enmetis klarigajn aŭ kompletigajn vortojn inter rektaj krampoj. La manuskriptoj estis de Markso nur malmulte strukturitaj per intertitoloj. Granda parto de la intertitoloj devenas de la redaktejo kaj estas indikitaj per rektaj krampoj. Ĉe tio ni uzis la intertitolojn de la MEGA-volumo. La rektaj krampoj ĉe Markso estas anstataŭigitaj per kunigaj krampoj.

Enkondukaj rimarkoj de la MEW-redaktejo

Ĉiuj iom longaj citaĵoj aperas malgrandlitere. Fremd-lingvaj citaĵoj en la teksto estas unuafoje tradukitaj en la germanan; ilia originala formo troveblas en la aldonajo.²⁴ Kiom eblas, ni prezentas tradukojn de citaĵoj, kiujn Markso aŭ Engelso mem uzis en la “Teorioj pri la pluslaboro”, en “La kapitalo” kaj en aliaj verkoj. [...]

*Instituto pri marksismo-leninismo
ĉe la CK de la SED*

24 Pri tiu aldono ni rezignis en tiu ĉi eldono. -vl

Rimarkoj de la tradukinto

La titolo de tiu ĉi verketo ne estas de Markso mem, pro tio ĝi aperas ĉi tie interkrampe. Ĝi estas uzata jam de jardekoj en la diskuto pri tiu ĉi teksto, nome tiu parto de la *Konturoj de la kritiko de la politika ekonomio* [*Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie*], plej ofte nomata mallonge *Konturoj* [*Grundrisse*], kiu okupiĝas pri la rolo de la maŝinaro en la kapitalismaj kaj ankaŭ en la postkapitalismaj produktado kaj socio. Temas pri la kajero 6 de la *Konturoj* [*Grundrisse*], de ties paĝoj 590 ĝis 608.

La traduko sekvas la version de la germana originalo tia, kia ĝi aperas en la volumo 42 de la verkaro de Markso kaj Engelo²⁵. Ĉar la lingvaĵo de la relative juna ŝtupo de la marka ekonomika esplorado estas ankoraŭ sufiĉe stampita de la hegela filozofio – nekutima al multaj legantoj –, eble kelkaj germanlingvaj legantoj emas kompari kelkajn teksterojn kun la germana originalo; por tion faciligi ni enmetis la paĝnumerojn de la germana eldono inter rektaj krampoj.

Klarigaj rimarkoj de la tradukinto en la tekstoj mem estas metitaj inter rektaj krampoj kaj markitaj kun lia siglo (-vl), same liaj piednotoj. Piednotoj de la germana eldonejo *Marx-Engels Werke* (MEW) estas markitaj per ĝia siglo (-mew).

Havano, en Aŭgusto de 2020

Vilhelmo Lutermano

25 Vidu la precizigon sur la paĝo 4, sub la kolofono.

Karlo Markso:

Konturoj de la kritiko de la politika ekonomio

(Oktoebro 1857 ĝis Majo 1958)

La ĉapitro pri la kapitalo – kajero 6 [p. 590]²⁶

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

[Fiksa kapitalo²⁷ kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

“Divido de la maŝinoj en 1. maŝinoj aplikataj por produkti forton; 2. maŝinoj, kiuj havas simple la celon transigi forton kaj plenumi laboron.” (Babbage [, p. 20/21], kajero, p. 10)

“*Fabrika* signifas la kunefikadon de laboristoj de pluraj aĝoklasoj, de plenkreskaj kaj ne plenkreskaj, kiuj kun lerteco kaj akurateco sekvas meĥanikan produktivan sistemon, kiu estas konstante movata de centra forto kaj ekskludas ĉian fabrikon, kies meĥanismo ne konsistigas kontinuecan sistemon aŭ ne estas kondiĉita de unu sola principo. Ekzemploj por tiu ĉi lasta grupo en fabrikoj por teksaĵoj, en kupro-gisejoj

26 Tiel ĉi tie kaj en la sekvo indikiĝas la paĝnumeroj de la germanlingva originalo. -vl

27 En tiu ĉi teksto Markso uzas ankoraŭ – alie ol en siaj postaj verkoj, ekz-e en *La kapitalo* – la franclingvajn esprimojn *Capital fixe* kaj *Capital circulant*, ambaŭ ĉi tie en Esperanto: *fiksa kapitalo* kaj *ĉirkulanta kapitalo*. -vl

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

ktp. – Tiu ĉi plej akra formo de la nocio disvolvas la imagon de giganta aŭtomato kunmetita el multnombraj *meĥanikaj kaj per intelekto provizitaj organoj*, kiuj agas inter si agorde kaj seninterrompe, ĉe kio ĉiuj ĉi organoj estas submetitaj al pelforto kiu movas sin per si mem.” (Ure [p. 18s], 13.)

La kapitalo, kiu en la produktadprocezo konsumas sin mem aŭ fiksa kapitalo estas, en emfaza senco, *produktadrimedo*. En pli vasta senco la tuta produktadprocezo kaj ĉiu ĝia momento, ekz-e de la cirkulado – tiom, kiom ĝi estas rigardata kiel materia –, estas nur produktadrimedo por la kapitalo, por kiu ekzistas nur la valoro²⁸ kiel memcelo. Rigardate materie mem, la krudmaterialo estas produktadrimedo por la produkto, ktp.

Sed la difino de la uzvaloro de la fiksa kapitalo kiel en la produktadprocezo konsumanta sin mem estas identa kun tio, ke en tiu ĉi procezo ĝi estas uzata nur kiel rimedo kaj eĉ ekzistas nur kiel aganto por la transformado de la krudmaterialo en produkton. Kiel tia produktadrimedo ĝia uzvaloro povas konsisti en tio, ke ĝi estas nur teĥnologia kondiĉo por la okazado de la procezo (la ejo, en kiu tiu produktadprocezo okazas), ekz-e ĉe konstruaĵoj ktp, aŭ ke ĝi estas senpera kondiĉo por la efikado de la vera

28 Valoro en la senco de intersanĝvaloro. Markso uzas la terminon valoro nur en la senco de intersanĝvaloro. Por la uzvaloro li uzas nur la terminon uzvaloro. -vl

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

produktadrimedo, kiel ĉiuj helpmaterialoj por la produktado. Ambaŭ siavice estas materiaj kondiĉoj por la okazado de la produktadprocezo entute aŭ por la aplikado kaj konservado de la laborrimedo. Sed tiu ĉi en la vera senco servas nur ene de la produktado kaj por la produktado kaj ne havas alian uzvaloron.

Origine, kiam ni rigardis la transiron de la valoro en la kapitalon, la laborprocezo estis simple enprenita en la kapitalon, kaj laŭ siaj materiaj kondiĉoj, laŭ sia materia ekzistado, la kapitalo aperis kiel la totaleco de la kondiĉoj de tiu procezo kaj, kongrue kun ĝi, apartiĝis en certajn kvalite malsamajn porciojn, kiel *labormaterialo* (tiu, ne krudmaterialo, estas la ĝusta kaj nocia esprimo), *laborrimedoj* kaj *vivanta laboro*. Unuflanke la kapitalo laŭ sia materia ekzisto disiĝis en tiujn ĉi 3 elementojn; aliflanke ilia movata unueco estis la *laborprocezo* (aŭ la kuna eniro de tiuj ĉi elementoj en procezon), la ne movata la produkto. En tiu ĉi formo la materiaj elementoj – labormaterialo, laborrimedoj kaj vivanta laboro – aperas nur kiel la esencaj elementoj / momentoj²⁹ de la laborprocezo mem, kiun la kapitalo alproprigas al si. Sed tiu ĉi materia flanko – aŭ ĝia difino kiel uzvaloro kaj reala procezo – tute diseriĝis kun sia form-difino. En tiu ĉi mem aperis

29 Markso uzas, laŭ germana kutimo, la vorton momento ankaŭ en la senco de elemento; en multaj okazoj ambaŭ signifoj ofte ja koincidas, ekz-e en la produktadprocezo. -vl

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

1-e la 3 elementoj, en kiuj ĝi aperas antaŭ la interŝanĝo kun la laborkapablo, antaŭ la vera procezo, nur kiel kvante diversaj porcioj de si mem, kiel valorkvantoj, kies unuecon ĝi mem estigas kiel sumon. La materia formo, de la uzvaloroj, en kiuj tiuj diversaj

[p. 592]

porcioj ekzistis, neniom ŝanĝis pri la sameco de tiu difino. Laŭ la termindifino ili aperis nur tiel, ke la kapitalo kvante apartiĝis en porciojn;

2-e ene de la procezo mem, rigardate laŭ la formo, la elementoj de la laboro kaj la du ceteraj distingas sin nur tiel, ke la unuaj estis difinitaj kiel konstantaj valoroj kaj la alia kiel valor-estiga. Sed tiom, kiom ankaŭ la malsameco kiel uzvaloroj, la materia flanko, estis konsiderata, ĝi tute falis ekster la formdifinon de la kapitalo. Sed nun, malsame ol la cirkulanta kapitalo (krudmaterialo kaj produkto) kaj fiksa kapitalo (laborrimedoj), la diferenco de la elementoj kiel uzvaloroj estas samtempe metita kiel diferenco de la kapitalo kiel kapitalo en sia formdifino. La rilato de la faktoroj inter si, kiu estis nur kvanta, nun aperas kiel kvalita diferenco de la kapitalo mem kaj kiel determinanta ĝian ĉioman moviĝon (Umschlag, cirkuladon). La labormaterialo kaj la produkto de la laboro, la neŭtrala rezulto de la laborprocezo, kiel *krudmaterialo* kaj

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

produkto, estas ankaŭ jam materiale determinitaj ne plu kiel materialo kaj produkto de la laboro, sed kiel la uzvaloro de la kapitalo mem en diversaj fazoj.

Tiom longe, kiom la laborrimedo en la vera senco de la vorto restas laborrimedo, tia, kia ĝi historie, de la kapitalo estas enprenita en ties plivalorigan procezon, ĝi suferas nur formalan ŝanĝon per tio, ke ĝi aperas nun ne plu nur en sia materiala flanko kiel rimedo de la laboro, sed samtempe kiel aparta ekzistmaniero de la kapitalo determinita de la ĉiomprocezo³⁰ de la kapitalo – kiel fiksa kapitalo.

Sed enprenita en la produktadprocezon de la kapitalo, la laborrimedo trairas diversajn metamorfozojn, kies lasta estas la *maŝino* aŭ pli ĝuste *aŭtomata sistemo de la maŝinaro* (sistemo de la maŝinaro; la *aŭtomata* estas nur ĝia plej perfekta adekvata formo kaj nur ĝi transformas la maŝinaron en sistemon), movata per aŭtomato, mova forto, kiu movas sin mem; tiu aŭtomato, konsistanta el multnombraj meĥanikaj kaj intelektaj organoj, tiel ke la laboristoj mem estas determinitaj nur kiel ĝiaj konsciaj membroj. En la maŝino kaj eĉ pli en la maŝinaro kiel aŭtomata sistemo la laborrimedo estas transformita laŭ sia uzvaloro, t.e. aŭfhebata [nuligita kaj sur pli alta nivelo konservata -vl]³¹ laŭ sia materia ekzisto en ekziston adekvatan al la fiksa kapitalo kaj al la kapitalo entute, kaj

30 La procezo de la kapitalo konsiderata en sia tuteco. -vl

31 Vidu la piednoton 15 sur p. 22. -vl

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

la formo, en kiu ĝi estis akceptita kiel rekta laborrimedo en la produktadprocezon de la kapitalo, [aŭfhebata -vl] en formon metitan de la kapitalo mem kaj kongruan al tiu. La maŝinaro en nenia rilato aperas kiel labor-

[p. 593]

rimento de la unuopa laboristo. Ĝia distinga trajto tute ne estas, kiel ĉe la laborrimedo, peri la agadon de la laboristo al la objekto; sed tiu agado estas metita tiel, ke ĝi jam nur peras la laboron de la maŝino, ties agon al la krudmaterialo – ĝin superrigardas kaj ŝirmas ĝin kontraŭ ĝenoj. Ne kiel ĉe la instrumento, kiun la laboristo kiel organo animas per sia propraj lerteco kaj agado kaj kies manipulado do dependas de lia virtuozezo. Sed la maŝino, kiu por la laboristo posedas lertecon kaj forton, estas mem la virtuozo, kiu posedas sian propran animon en la meĥanikaj leĝoj en ĝi efikantaj kaj por ĝia konstanta memmovado, same kiel la laboristo konsumas nutraĵojn, tiel ĝi karbojn, oleon ktp teksmaterialojn por la produktado). La agado de la laboristo, limigita al nura abstraktado de la agado, estas laŭ ĉiuj flankoj determinita kaj reguligita per la moviĝo de la maŝinaro, ne inverse. La scienco, kiu devigas la senvivajn membrojn de la maŝinaro efiki per sia konstruiteco laŭcele kiel aŭtomato, ne ekzistas en la konscio de la laboristo, sed tra la maŝino efikas al li kiel fremda potenco, kiel potenco de la maŝino mem.

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

La alproprigo de la vivanta laboro fare de la konkretigita laboro – de la plivaloriga forto aŭ agado fare de la valoro ekzistanta por si mem, kiu troviĝas en la nocio de la kapitalo, en la produktado baziĝanta sur maŝinaro kiel karaktero de la produktadprocezo mem estas metita ankaŭ laŭ siaj materiaj elementoj kaj laŭ sia materia moviĝo. La produktadprocezo ĉesis esti laborprocezo en la senco, ke la laboro superus ĝin kiel la unuo ĝin reganta. Male, ĝi aperas jam nur kiel konscia organo, ĉe multaj punktoj de la meĥanika sistemo en unuopaj vivantaj laboristoj; disigitaj, subigitaj sub la ĉiomprocezon de la maŝinaro mem, mem nur membro de la sistemo, kies unueco ekzistas ne en la vivantaj laboristoj, sed en la vivanta (aktiva) maŝinaro, kiu, kompare al lia unuopa, sensignifa farado aperas vidal-vide de li kiel potenca organismo. En la maŝinaro la konkretigita laboro alpaŝas la vivantan laboron en la laborprocezo mem kiel la potenco ĝin reganta, kiu la kapitalo kiel alproprigo de la vivanta laboro laŭ sia formo estas. La alpreno de la laborprocezo kiel nura momento / elemento de la plivaloriga procezo de la kapitalo estas ankaŭ laŭ la materia flanko metita per la transformado de la laborrimedo en maŝinaron kaj de la vivanta laboro en nuran vivantan apartenaĵon de tiu maŝinaro; kiel rimedo de ĝia agado.

[p. 594]

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

La pliigo de la produktadforto de la laboro kaj la plej granda negacio³² de la necesa laboro estas la necesa tendenco de la kapitalo, kiel ni vidis. La realigo de tiu tendenco estas la transformado de la laborrimedo en maŝinaron. En la maŝinaro la konkretigita laboro materie alpaŝas la vivantan kiel la reganta potenco kaj kiel ĝia aktiva subigo de la vivanta sub sin, ne nur per ties alproprigo, sed en la reala produktadprocezo mem; la rilato de la kapitalo kiel la valoro alpropriganta al si la plivalorigan agadon estas en la fiksa kapitalo, kiu ekzistas kiel maŝinaro, samtempe metita kiel la rilato de la uzvaloro de la kapitalo al la uzvaloro de la laborkapablo; la valoro konkretigita en la maŝinaro aperas krome kiel antaŭkondiĉo, kontraŭ kiu la plivaloriga forto de la unuopa laborkapablo malaperas kiel nerimarkebla etaĵo; per la produktado en eksterordinaraj amasoj, kiu estas metita per la maŝinaro, ĉe la produkto same malaperas ĉia rilato al la rekta bezono de la produktanto kaj pro tio al la rekta uzvaloro; en la formo, kiel la produkto estas produktata, kaj en rilatoj, en kiuj ĝi estas produktata, estas jam metita, ke ĝi estas produktita nur kiel portanto de valoro kaj ĝia uzvaloro nur kiel kondiĉo por tio. La konkretigita laboro aperas en la maŝino rekte mem ne nur en la formo de la produkto aŭ de la produkto aplikata kiel laborrimedo, sed de la produktadforto mem. La disvolvado de la laborrime-

32 Negacio, en la senco de aŭfhebo: neniigo kaj reapero sur pli alta nivelo. -vl

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

do al maŝinaro ne okazis hazarde por la kapitalo, sed ĝi estas la historia transformado de la tradicie heredita laborrimedo transformita adekvate al la kapitalo. La akumulado de scio kaj de lerteco, de la ĝeneralaj produktadfortoj de la socia cerbo, tiel estas sorbita en la kapitalo vid-al-vide de la laboro kaj pro tio aperas kiel eco de la kapitalo, kaj pli precize de la *fiksa kapitalo*, tiom, kiom ĝi kiel vera produktadrimedo eniras en la produktadprocezon. La *maŝinaro* do aperas kiel la plej adekvata formo de la *fiksa kapitalo* kaj la fiksa kapitalo, tiom, kiom la kapitalo estas rigardata en sia rilato al si mem, aperas kiel la *plej adekvata formo de la kapitalo entute*. Aliflanke, tiom, kiom la fiksa kapitalo en sia ekzistado estas firme tenata kiel certa uzvaloro, ĝi ne kongruas kun la nocio de la kapitalo, kiu kiel valoro estas indiferenta al ĉia difinita formo de uzvaloro kaj povas alpreni aŭ demeti ĉian tian formon kiel indiferentan enkarniĝon. Laŭ tiu flanko, laŭ la rilato de la kapitalo al la ekstero, la *cirkulanta kapitalo* aperas kiel la adekvata formo de la kapitalo kontraŭ la fiksa kapitalo.

[p.595]

Krome, tiom, kiom la maŝinaro plu evoluas kun la akumulado de la soci-scienco, produktadforto entute, la ĝenerale socia laboro prezentiĝas ne en la laboristo, sed en la kapitalo. La produktadforto de la socio mezuriĝas laŭ la

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

fiksa kapitalo, ekzistas en ĝi en konkretigita formo, kaj inverse la produktadforto de la kapitalo evoluas kun tiu ĉi ĝenerala progreso, kiun la kapitalo alproprigas al si senpage. Ĉi tie ne estas la tasko okupiĝi detale pri la evoluo de la maŝinaro; sed nur laŭ la ĝenerala flanko; tiom, kiom en la *fiksa kapitalo* la *laborrimedo*, laŭ sia materiala flanko, perdas sian rektan formon kaj materiale alpaŝas kiel *kapitalo* la laboriston. La scio aperas en la maŝinaro kiel fremda ekstere de li; kaj la vivanta laboro kiel subigita sub la memstare efikanta konkretigita. La laboristo aperas kiel superflua, tiom, kiom lia agado ne estas kondiĉita de la bezonoj [de la kapitalo].

La plena evoluo de la kapitalo do okazas – aŭ la kapitalo metis la produktadmanieron kongruan kun ĝi –, nur ekde kiam la laborrimedo estas determinita ne nur formale kiel *fiksa kapitalo*, sed en sia rekta formo estas aŭfhebata³³ kaj la *fiksa kapitalo* ene de la produktadprocezo kiel maŝino alpaŝas la laboron; sed la tuta produktadprocezo ne kiel subigita sub la rekta lerteco de la laboristo, sed kiel teĥnologia aplikado de la scienco. Doni al la produktado sciencan karakteron, pro tio [estas] la tendenco de la kapitalo, kaj la rekta laboro malaltigita al nura elemento de tiu procezo. Same kiel ĉe la transformado de la valoro en kapitalon, tiel ĉe pli proksima rigardo al la

33 Nuligita kaj samtempe konservata sur pli alta ŝtupo, vidu pn 15. -
vl

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

kapitalo montriĝas, ke unuflanke ĝi antaŭkondiĉas certan donitan historian disvolvitecon de la produktadfortoj – inter tiuj produktadfortoj ankaŭ la sciencon –, aliflanke progresigas kaj fortigas ilin.

La kvanta amplekso, kaj la efikeco (intenso), en kiuj la kapitalo evoluis kiel fiksa kapitalo, pro tio entute montras la gradon, en kiu la kapitalo kiel kapitalo, kiel la potenco super la vivanta laboro estas evoluinta kaj submetinta al si la produktadprocezon entute. Ankaŭ laŭ tiu flanko, ke ĝi esprimas la akumuladon de la konkretigitaj produktadfortoj kaj same de la konkretigita laboro. Sed se la kapitalo en la maŝinaro kaj en aliaj materiaj ekzistoformoj de la fiksa kapitalo, kiel fervojoj ktp (pri kio ne parolos poste) donas al si sian adekvatan formon kiel uzvaloro ene de la produktad-

[p. 596]

procezo, tiam tio tute ne signifas, ke tiu uzvaloro – la maŝinaro per si mem – estas kapitalo aŭ ke ĝia ekzisto kiel maŝinaro estas identa kun ĝia ekzisto kiel kapitalo; same kiel la oro ne ĉesus havi sian uzvaloron kiel oro, ekde kiam ĝi jam ne estus *mono*. La maŝinaro ne perdas sian uzvaloron, ekde kiam ĝi ĉesus esti kapitalo. El tio, ke la maŝinaro estas la plej kongrua formo de la uzvaloro de la fiksa kapitalo, tute ne sekvas, ke la subigo sub la socian

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

rilaton de la kapitalo estas la plej kongrua kaj plej socia produktadrilato por la aplikado de la maŝinaro.

Tiom, kiom la labortempo – la nura kvanto de laboro – metiĝas de la kapitalo kiel sola valordifina elemento, tiom la rekta laboro malaperas kaj ĝia kvanto kiel la determinanta principo de la produktado – la kreado de uzvaloroj – kaj same kvante estas reduktita al pli malalta proporcio kiel ankaŭ kvalite kiel ja nemalhavebla, sed malsupera elemento kontraŭ la ĝenerala scienca laboro, teĥnologia aplikado de la natursciencoj ĉe unu flanko, kiel [kontraŭ la] ĝenerala produktadforto, kiu estiĝas el la socia strukturo en la ĉiomproduktado – kaj kiu aperas kiel naturdonaco de la socia laboro (kvankam historia produkto). La kapitalo tiel laboras por sia propra dissolviĝo kiel formo reganta la produktadon.³⁴

Se tiel unuflanke la transformado de la produktadprocezo el la simpla laborprocezo en sciencan procezon, kiu submetas la naturfortojn al sia servo kaj tiel igas ilin efiki en la servo de la homaj bezonoj, aperas kiel eco de la *fiksa kapitalo* kontraŭ la vivanta laboro; se la unuopa laboro kiel tia entute ĉesas aperi kiel produktiva, sed estas produktiva nur en la komunaj laboroj subordinantaj al si la

34 Pri tiu aspekto interesas la ĉapitro de Markso el la 3-a volumo de *La kapitalo* pri la leĝo de la tendenca falo de la profitkvoto. Ĝi aperis en Esperanto en la broŝuro Karlo Markso: Leĝo de la tendenca falo de la profitkvoto (MAS-libro n-ro 241). -vl

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

naturfortojn kaj tiu levado de la rekta laboro en socian aperas kiel redukto de la unuopa laboro al la senhelpeco kontraŭ la komuneco reprezentata, koncentrita en la kapitalo; tiam aliflanke nun aperas kiel eco de la *irkulanta kapitalo* la konservado de la laboro en unu produktadbranĉo per samtempa kunekzistado de la laboro en alia. En la malgranda irkulado la kapitalo antaŭpagas al la laboristo la salajron, kiun tiu interŝanĝas kontraŭ produktoj necesaj por sia konsumado. La mono ricevita de li havas tiun ĉi povon nur ĉar samtempe apud li laboras aliaj; kaj nur ĉar la kapitalo alproprigas al si lian laboron, ĝi povas doni al li en formo de mono asignon je fremda laboro.

[p. 597]

Tiu ĉi interŝanĝo de la propra laboro kun la fremda ĉi tie aperas ne per la samtempa kunekzistado de la laboro de la aliaj perate kaj kondiĉite, sed per la antaŭpago, kiun la kapitalo faras. Ĝi aperas kiel eco de parto de la irkulanta kapitalo, kiu estas cedata al la laboristo, kaj de la irkulanta kapitalo entute, ke la laboristo dum la produktado povas okazigi la metabolon necesan por sia konsumado. Ĝi ne aperas kiel metabolo de la samtempaj laborfortoj, sed kiel metabolo de la kapitalo; de tio, ke irkulanta kapitalo ekzistas. Tiel ĉiuj fortoj de la laboro estas transponataj en fortojn de la kapitalo; en la fiksa kapitalo la

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

produktadforto de la laboro (kiu estas metita ekster ĝi kaj kiel ekzistanta sendepende (fakte) de ĝi; kaj en la cirkulanta kapitalo unuflanke tio, ke la laboristo mem antaŭkondiĉis al si la kondiĉojn de ripetado de sia laboro, aliflanke la interŝanĝo de tiu lia laboro estas perata de la kunekzistanta laboro de aliaj, aperas tiel, ke la kapitalo faras al li la antaŭpagojn kaj aliflanke estigas la samtempecon de la laborbranĉoj. (La du lastaj determinaĵoj estas envere parto de la akumulado) La kapitalo metas sin kiel peranton inter la diversaj laboristoj en la formo de la cirkulanta kapitalo.

La *fiksa kapitalo*, en sia difino kiel produktadrimedo, kies plej adekvata formo estas la maŝinaro, produktas valoron, t.e. pliiĝas la valoron de la produkto nur laŭ du flankoj: 1-e tiom, kiom ĝi havas valoron; do estas mem produkto de laboro, certa kvanto de laboro en konkretigita formo; 2-e tiom, kiom ĝi pliiĝas la proporcion de la pluslaboro al la necesa laboro, per tio ke ĝi kapabligas la laboron per pliiĝo de ĝia produktadforto krei pli grandan mason de la produktoj necesaj por vivteni la vivantan laborkapablon en malpli longa tempo. Estas do plej absurda burĝa frazo, ke la laboristo dividas kun la kapitalisto, ĉar tiu ĉi per la fiksa kapitalo (kiu cetere estas mem produkto de la laboro kaj nur *fremda laboro* alproprigita de la kapitalo) faciligas al li lian laboron (pli ĝuste per la maŝino li forrabas al li ĉian memstarecon kaj allogan karakteron) aŭ mallongigas lian laboron. La kapitalo pli

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

ĝuste aplikas la maŝinon nur tiom, kiom ĝi kapabligas la laboriston labori pli grandan parton de sia tempo por la kapitalo, rilati al pli granda parto de sia tempo kiel ne apartenanta al li, labori pli longe por iu alia. Per tiu procezo efektive la kvanto de laboro necesa por produktado de certa objekto estas reduktata al minimumo, sed nur por ke maksimumo da laboro estu plivalorigota en maksimumon de tiaj objektoj. La unua flanko estas

[p. 598]

grava, ĉar la kapitalo ĉi tie – tute senintence – reduktas la homan laboron al minimumo, la elspezon de forto. Tio utilos al la emancipita laboro kaj estas la kondiĉo de ĝia emancipiĝo.

El tio dirita evidentas la absurdeco de Lauderdale, kiam li volas fari la fiksan kapitalon fonto de valoro memstara, sendependa de la labortempo.³⁵ Ĝi estas tia fonto nur tiom, kiom ĝi mem metas konkretigitan labortempon kaj kiom ĝi metas plusvaloron. La maŝinaro mem por sia aplikiĝo historie antaŭkondiĉas – vidu supre Ravenstone³⁶ – superfluajn manojn. Nur tie, kie ekzistas superfluo de labor-

35 [309] Pri tiu opinio de Lauderdale Markso okupiĝas en la “Teorioj pri la plusvaloro” (MEW, vol. 26,1, p. 64s kaj 269. -mew

36 Piercy Ravenstone, “Thoughts on the funding system, and its effects”, Londono, 1824, p. 11, 13 kaj 46. -mew

[192] Piercy Ravenstone (– 1830, angla ekonomikisto, adepto de Rikardo; li defendis la interesojn de la proletaro, argumentis kontraŭ Malthus. -mew

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

fortoj la maŝinaro intervenas por anstataŭigi laboron. Okazas nur en la imago de ekonomikistoj, ke ĝi helpas al la unuopa laboristo. Nur kun amasoj da laboristoj ĝi povas efiki, kies koncentriĝo fronte al la kapitalo estas unu el ĝiaj historiaj antaŭkondiĉoj, kiel ni vidis. Ĝi ne envenas por anstataŭigi mankantan laborforton, sed por redukti amason da ekzistanta al ĝia necesa mezuro. Nur kie la laborkapablo amase ekzistas, la maŝinaro envenas. (Necesas reveni al tio ĉi.)

Lauderdale kredas esti farinta grandan malkovron, ke maŝinaro ne pliigas la produktadforton de la laboro, ĉar male ĝi anstataŭigas ĝin aŭ faras tion, kion la laboro per sia forto ne povas fari. Estas parto de la nocio de la kapitalo, ke la pliigita produktadforto de la laboro estas metita ĝuste kiel pliigo de forto ekster ĝi kaj kiel ĝia propra senfortigo. La laborrimedo faras la laboriston memstara – metas lin kiel proprietulon. La maŝinaro – kiel fiksa kapitalo – metas lin kiel ne memstaran, metas lin kiel alproprigitan. Tiu ĉi efiko de la maŝinaro validas nur tiom, kiom ĝi estas difinita kiel fiksa kapitalo, kaj ĝi estas difinita kiel tia nur per tio, ke la laboristo rilatas al ĝi kiel dunglaboristo kaj la aganta individuo entute kiel nura laboristo.

Dum ĝis nun fiksa kapitalo kaj cirkulanta kapitalo aperas nur kiel diversaj preterpasantaj determinadoj de la kapitalo, ili nun estas rigidiĝintaj al apartaj ekzistadmani-

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

eroj de ĝi, kaj apud la fiksa kapitalo aperas la cirkulanta kapitalo. Nun estas du apartaj specoj de kapitalo. Tiom, kiom kapitalo estas rigardata en certa produktadbranĉo, ĝi aperas dividita en tiuj du porcioj aŭ disfalas en certa proporcio en tiujn du specojn de la kapitalo.

La diferenco interne de la produktadprocezo, origine laborrimedoj kaj labormaterialo kaj fine laborprodukto, aperas nun kiel

[p. 599]

cirkulanta kapitalo (la du lastaj) kaj fiksa kapitalo. La distingo de la kapitalo laŭ ĝia nur materia flanko estas nun alprenita en ĝia formo kaj aperas kiel ĝin diferenciganta.

Por la opinio, kiu, kiel *Lauderdale* ktp, volas igi la kapitalon kiel tian, disigite de laboro, krei valoron kaj do ankaŭ plusvaloron (aŭ profiton), la fiksa kapitalo – nome tiu, kies materia ekzisto aŭ uzvaloro estas la maŝinaro – estas la formo, kiu al iliaj supraĵaj falsaj konkludoj ankorau donas la plej multan ŝajnon. Kontraŭ ili, ekz-e en “Labour defended”, ke eble la vojfaristo emus dividi kun la vojuzanto, sed ne la “vojo” mem.³⁷

37 [310] Markso ĉi tie referencas la sekvan tekston el la anonima verko de Thomas Hodgskin: “Labour defended against the claims of capital ...”, Londono, 1825, p. 16: “Estas facile komprenebla, kial ... la vojkonstruisto devas ricevi iom el la gajno, kiun sole la uzanto de la vojo tiras el ĝi. Sed mi ne komprenas, *kial la tuta gajno de la vojo mem devas alflui* kaj de serio da personoj, kiuj la

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

La cirkulanta kapitalo – kondiĉe ke ĝi vere trairas siajn diversajn fazojn, la malpliigo aŭ pliigo, la mallongo aŭ longo de la cirkulada tempo, la pli facilan aŭ pli pena iradn tra la diversaj stadioj de la cirkulado efikas malpliigon de la plusvaloro, kiu en donita tempo povus kreiĝi sen tiuj interrompoj – aŭ, *ĉar la nombro de reproduktadoj fariĝas pli malgranda aŭ ĉar la kvanto de la kapitalo konstante troviĝanta en la produktadprocezo* reduktiĝas. En ambaŭ kazoj tio ne estas malpliigo de la premisita valoro, sed malpli granda rapido en ĝia kreskado. Sed ekde kiam la fiksa kapitalo evoluis al certa etendiĝo – kaj tiu etendiĝo estas, kiel indikite, la mezurilo de la evoluo de la granda industrio entute – do pliĝas en proporcio al la evoluo de ĝiaj produktadfortoj – ĝi estas mem la konkretiĝo de tiuj produktadfortoj, ĝi mem kiel premisita produkto –, ekde tiu momento ĉia interrompo de la produktadprocezo efikas rekte kiel malpliigo de la kapitalo mem, de ĝia premisita valoro. La valoro de la fiksa kapitalo estas reproduktata nur tiom, kiom ĝi estas konsumata en la produktadprocezo. Per neuzado ĝi perdas sian uzvaloron, sen ke ĝia valoro transiras al la produkto. Do, en ju pli granda skalo la fiksa kapitalo evoluas, en la signifo, en kiu ni ĉi tie ĝin rigardas, *des pli la kontinueco de la produktadprocezo aŭ*

vojon nek faras nek uzas, sub la nomo de profito estu alproprigata por sia kapitalo.” Markso detale diskutas la opiniojn de Hodgskin en la “Teorioj pri la plusvaloro” (vidu MEW, vol. 26.3, p. 259-313.) -mew

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

la konstanta fluo de la produktado fariĝas ekstere deviga kondiĉo de la produktadmaniero baziĝanta sur la kapitalo.

La alproprigo de la vivanta laboro fare de la kapitalo akiras en la maŝinaro ankaŭ tiuflanke rektan realon: Ĝi estas unufanke rekte el la scienco fontanta analizado kaj aplikado de

[p. 600]

meĥanikaj kaj ĥemiaj leĝoj, kiuj kapabligas la maŝinon fari la saman laboron, kiun antaŭe faris la laboristo. Sed la disvolvado de la maŝinaro sur tiu vojo okazas nur, ekde kiam la granda industrio jam atingis pli altan ŝtupon kaj ĉiuj sciencoj estas kaptitaj en la servo de la kapitalo; aliflanke la ekzistanta maŝinaro mem donas jam grandajn resursojn. La invento tiam fariĝas negoco kaj la aplikado de la scienco al la rekta produktado mem fariĝas vidpunkto por ĝi determinanta kaj pelanta. Sed tio ne estas la vojo, sur kiu la granda maŝinaro estiĝis, kaj eĉ malpli tiu, sur kiu ĝi detale progresas. Tiu vojo estas la analizado – per divido de la laboro, kiu transformas la operaciojn de la laboristoj jam pli kaj pli en meĥanikajn, tiel ke sur certa punkto la meĥanismo povas enpaŝi en ties lokon. (Koncerne ekonomion de la forto) Do ĉi tie rekte la determinita labormaniero aperas transigita de la laboristo al la kapitalo en la formo de la maŝino kaj per tiu transponado lia propra laborkapablo aperas malplivalorigita. Pro tio la batalo de

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

la laboristoj kontraŭ la maŝinaro. Tio, kio estis la agado de la vivanta laboristo, fariĝas agado de la maŝino. Tiel al la laboristo krudsense alpaŝas la alproprigo de la laboro fare de la kapitalo, la kapitalo kiel sorbanta la vivantan laboron – “kvazaŭ ĝi havus amon enkorpe”.³⁸

La interŝanĝo de vivanta laboro kontraŭ konkretigita, t.e. la metado de la socia laboro en la formo de la kontraŭ-eco de kapitalo kaj dunglaboro – estas la lasta evoluo de la *valorrilato* kaj de la produktado baziĝanta sur la valoro. Ĝia premo estas kaj restas – la maso da rekta labortempo, la kvanto de aplikata laboro kiel la decida faktoro de la produktado de riĉaĵo. Sed tiom, kiom la granda industrio evoluas, la kreado de la reala riĉaĵo dependiĝas malpli de la labortempo kaj de la kvanto de aplikata laboro ol de la potenco de la agantaj faktoro, kiuj dum la labortempo estas movataj kaj kiuj siavice mem – kies potenca efikeco mem siavice neniel rilatas kun la rekta labortempo, kiun ilia produktiĝo kostas, sed dependas de la ĝenerala stato de la scienco kaj de la progreso de la teĥnologio, aŭ de la aplikado de tiu scienco al la produktado. (La disvolvado de tiu scienco, speciale de la naturscienco kaj kun ĝi de ĉiuj ceteraj, siavice mem rilatas kun la disvolvado de la materia produktado.) La kampkulturo ekz-e fariĝas nura aplikado de la scienco de la materia

38 Citaĵo de Goeto [*Johann Wolfgang Goethe*]: “Faŭsto. Unua parto de la tragedio”, sceno “La kelo de Aŭerbaĥ en Lepsiko”. -mew

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

[p. 601]

metabolo, same kiel tiu ĉi plej favore reguligenda por la tuta socia korpo. La reala riĉaĵo pli ĝuste montriĝas – kaj tio malkaŝas la grandan industrion – en monstra misrilato inter la aplikata labortempo kaj ĝia produkto kiel same en kvalita misrilato inter la laboro reduktita al pura abstraktaĵo kaj la potenco de la produktadprocezo, kiun ĝi super-rigardas. La laboro aperas ne plu tiom kiel enfermita en la produktadprocezo, ol la homo kiel gardanto kaj reguliganto rilatas al la produktadprocezo mem. (Tio pri la maŝinaro validas same pri la kombinado de la homa agado kaj pri la disvolvado de la homa interrilato.) Jam ne estas la laboristo, kiu enŝovas modifitan naturobjekton kiel mezan membron inter la objekton kaj sin; sed la naturprocezon, kiun li transformas en industrion, li ŝovas kiel rimedon inter sin kaj la neorganikan naturon, kiun li ekmastras. Li paŝas apud la produktad-procezon anstataŭ esti ĝia ĉefa aganto. En tiu ĉi transformado ne estas la rekta laboro, kiun la homo plenumas, nek la tempo, dum kiu li laboras, sed la alproprigo de lia propra ĝenerala produktadforto, lia kompreno de la naturo kaj ĝia regado per lia ekzisto kiel socia korpo – per unu vorto la evoluo de la socia individuo, kiu aperas kiel la granda ĉefpiliero de la produktado kaj de la riĉaĵo. La *ŝtelado de fremda labortempo, sur kiu la nuna riĉaĵo baziĝas*, aperas mizera bazo kontraŭ tiu ĉi nove disvolvita, de la granda industrio mem kreita. Ekde

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

kiam la laboro en rekta formo ĉesis esti la granda fonto de la riĉaĵo, ĉesas kaj devas ĉesi la labortempo esti ĝia mezuro kaj do la interŝanĝvaloro la mezuro de la uzvaloro. La *pluslaboro de la amaso* ĉesis esti la kondiĉo por la evoluo de la ĝenerala riĉaĵo, same kiel la *nelaboro de la malmultaj* ĉesas esti la kondiĉo de la evoluo de la ĝeneralaj potencoj de la homa kapo. Per tio la produktado baziĝanta sur la interŝanĝvaloro kolapsas, kaj al la rekta materia produktadprocezo mem la formo de la provizoreco³⁹ kaj de kontraŭeco⁴⁰ estas forigata. La libera evoluo de la individuoj kaj do ne la reduktado de la necesa labortempo por anstataŭigi pluslaboron, sed entute la reduktado de la necesa laboro de la socio al minimumo, al kiu tiam kongruas la arta, scienca ktp elformiĝo de la individuoj per la tempo liberigita por ili ĉiuj kaj per la kreitaj rimedoj.

La kapitalo estas mem la procedanta kontraŭeco per tio, ke ĝi strebas redukti la labortempon al minimumo, dum ĝi aliflanke metas la labortempon kiel solan mezuron kaj fonton de la riĉaĵo. Pro tio ĝi malpliigas

[p. 602]

la labortempon en la formo de necesa, por pliiĝi ĝin en la formo de la superflua; pro tio ĝi metas la superfluan pli kaj

39 En aliaj marksaj tekstoj: anarĥio. -vl

40 En aliaj marksaj tekstoj: antagonismo. -vl

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

pli kiel kondiĉon – demandon de vivo kaj morto – por la necesa. Ĉe la unua flanko ĝi do estigas ĉiujn potencojn de la scienco kaj de la naturo same kiel de la socia kombinaĵo kaj de la socia interrilato, por fari la kreadon de riĉaĵo (relative) sendependa de la labortempo aplikata al ĝi. Ĉe la alia flanko ĝi volas tiujn tiel kreitajn gigantajn sociajn fortojn mezuri laŭ la labortempo kaj enfermi ilin en la limojn, kiuj necesas por konservi la jam kreitan valoron kiel valoron. La produktadfortoj kaj la sociaj interrilatoj – ambaŭ diversaj flankoj de la evoluo de la socia individuo – aperas al la kapitalo nur kiel rimedo kaj ili estas por ĝi nur rimedoj, por produktadi sur ĝia limigita bazo. Sed fakte ili estas la materiaj kondiĉoj por ilin eksplodigi.

“Vere riĉa estas nacio, se anstataŭ dum 12 horoj oni laboras nur 6. Riĉaĵo ne estas komando de pluslabora tempo” (reala riĉaĵo), “sed disponebla tempo ekster tiu uzata en la rekta produktado por ĉiu individuo kaj la tuta socio.”⁴¹

La naturo ne konstruas maŝinojn, nek lokomotivojn, fervojojn, elektrajn telegrafojn, aŭtomatajn ŝpinmaŝinojn ktp. Ili estas produktoj de la homa industrio; natura materialo, transformita en organojn de la homa volo super

41 [312] “The source and remedy of the national difficulties ...”, Londono, 1821, p. 6. Markso donas analizon de tiu anonima verko en la “Teorioj pri la plusvaloro” (vidu MEW vol. 26.3, p. 234-253. -mew

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

la naturo aŭ de lia agado en la naturo. Ili estas *organoj de la homa cerbo kreitaj de la homa mano*; konkretigita volforto. La evoluo de la fiksa kapitalo montras, ĝis kiom la ĝenerala socia scio, konoj, fariĝis senpera produktadforto kaj pro tio la kondiĉoj de la socia vivprocezo mem venis sub la regadon de la ĝenerala intelekto kaj estas laŭ tiu ĉi transformitaj. Ĝis kiom la sociaj produktadfortoj estas produktitaj, ne nur en la formo de sciado, sed kiel senperaj organoj de la socia praktiko; de la reala vivprocezo.

Laŭ krome alia flanko la evoluo de la fiksa kapitalo montras la gradon de la evoluo de la riĉaĵo entute aŭ de la evoluo de la kapitalo. La objekto de la produktado senpere direktita al la uzvaloro kaj same senpere al la interŝanĝvaloro estas la produkto mem, destinita por la konsumado. La parto de la produktado direktita al la fiksa kapitalo

[p. 603]

ne produktas senperajn aĵojn de ĝuado nek senperajn interŝanĝvalorojn; almenaŭ ne interŝanĝvalorojn senpere realigeblajn. *Do, dependas de la jam atingita grado de la produktivo – de tio, ke parto de la produktadtempo sufiĉas por la rekta produktado –, ke kreskanta granda estas aplikata por la produktado de la produktadrimedoj.* Por tio necesas, ke la socio povu atendi; depreni grandan parton

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

de la jam kreita riĉaĵo, same el la rekta ĝuado kiel el la produktado destinita por rekta ĝuado, por uzi tiun parton por *ne rekte produktiva laboro* (interne de la materia produktadprocezo mem). Tio postulas altecon de la jam atingita produktivo kaj relativan superabundon, kaj pli precize tian altecon rekte en la proporcio al la transformado de cirkulanta kapitalon en fiksan kapitalon. Same kiel *la granda de la relativa pluslaboro dependas de la produktivo de la necesa laboro, tiel la granda de la labortempo aplikata al la produktado de la fiksa kapitalo* – de vivanta same kiel de konkretigita – *dependas de la produktivo de la labortempo destinita al la rekta produktado de produktoj*. Supernecesa⁴² loĝantaro (el tiu ĉi vidpunkto) same kiel plusproduktado por tio estas kondiĉo. Tio signifas, ke la rezulto de la tempo aplikata al la rekta produktado devas esti relative tro granda por bezoni ĝin rekte por la reproduktado de la kapitalo aplikata en tiuj industribranĉoj. *Ju malpli la fiksa kapitalo rekte alportas fruktojn, intervenas en la rektan produktadprocezon, des pli granda devas esti tiu ĉi relativa plusloĝantaro [superloĝantaro] kaj plusproduktado*; do pli por konstrui fervojojn, kanalojn, akvoduktojn, telegrafojn ktp, ol por rekte en la senpera produktadprocezo aganta maŝinaro. Pro tio – kaj al tio ni revenos poste – en la konstanta super- kaj subproduktado de la moderna industrio – konstantaj ŝanceliĝadoj kaj bataloj pro la misproporcio, en kiu jen tro

42 “Plusloĝantaro” pli laŭvorte, ja paralele al “pluslaboro” kaj “plusproduktado”. -vl

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

malmulte, jen tro multe da cirkulanta kapitalo estas transformata en fiksan kapitalon.

[*La kreado de multe da disponebla tempo*] ekster la necesa labortempo por la socio entute kaj por ĉiu ĝia membro (t.e. spaco por la disvolvado de la plenaj produktadfortoj de la unuopuloj, pro tio ankaŭ de la socio), tiu ĉi kreado de ne-labortempo, sur la starpunkto de la kapitalo, same kiel de ĉiuj antaŭaj ŝtupoj, aperas kiel ne-labortempo, libera tempo por kelkaj homoj. La kapitalo aldonas, ke ĝi pliigas la pluslabortempon de la amaso per ĉiaj rimedoj de la arto kaj de la scienco, ĉar ĝia [de la kapitalo -vl] riĉaĵo konsistas rekte el la alproprigo de pluslabortempo; ĉar ĝia celo estas rekte

[p. 604]

la valoro, ne la uzvaloro. Ĝi estas tiel, malgraŭvole, instrumento por kreado de la antaŭkondiĉoj por socie disponebla tempo, por redukti la labortempon por la tuta socio al falanta minimumo kaj tiel liberigi la tempon de ĉiuj por ilia propra disvolviĝo. Sed ĝia tendenco estas ĉiam, unuflanke *krei disponeblan tempon*, aliflanke *transformi ĝin en pluslaboron*. Se la unua sukcesas al ĝi tro bone, tiam ĝi suferas je plusproduktado, kaj tiam la necesa laboro interrompiĝas, ĉar *se ne estiĝas plusvaloro la kapitalo ne povas plivaloriĝi*. Ju pli tiu kontraŭeco evoluas, des pli montriĝas, ke la kreskado de la produktadfortoj ne plu

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

povas esti katenita al la alproprigo de fremda pluslaboro, sed ke la laboristaj amasoj mem devas alproprigi al si sian pluslaboron. Se ili tion faris – kaj per tio la *disponebla tempo* ĉesas havi kontraŭecan ekziston –, tiam unuflanke la necesa labortempo havos sian mezuron ĉe la bezonoj de la socia individuo, aliflanke la disvolvado de la socia produktadforto kreskos tiom rapide, ke, kvankam la produktado estas nun kalkulata laŭ la riĉaĵo de ĉiuj, la disponebla tempo de ĉiuj kreskas. Ĉar la reala riĉaĵo estas la disvolvita produktadforto de ĉiuj individuoj. Tiam tute ne plu la labortempo, sed la disponebla tempo estas la mezuro de la riĉaĵo. *La labortempo kiel mezuro de la riĉaĵo* metas la riĉaĵon mem kiel bazitan sur la malriĉeco kaj la disponeblan tempon nur ekzistantan en kaj per la kontraŭeco al la pluslabortempo aŭ metado de la tuta tempo de la individuo kiel labortempo kaj lia tuta degradado al nura laboristo, [lia -vl] subigo sub la laboron. *La plej disvolvita maŝinaro devigas la laboriston nun labori pli longe ol la sovaĝulo faras aŭ ol li mem faris eĉ per la plej simplaj, plej krudaj instrumentoj.*

“Se la tuta laboro de lando sufiĉus nur por certigi la vivtenadon de la tuta loĝantaro, tiam ne ekzistus *pluslaboro*, sekve ankaŭ nenio, kio akumulibus kiel kapitalo. Se la popolo dum unu jaro produktas sufiĉe por la vivtenadon de 2 jaroj, tiam la konsumrimedoj por unu jaroj devas pereji, aŭ la loĝantaro devas dum unu jaro ĉesi labori produktive. Sed *la posedantoj*

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

de la plusprodukto aŭ de la kapitalo laborigas la loĝantaron pri io, kio ne estas rekte kaj senpere produktiva, ekz-e pri la konstruado de maŝinaro. Tiel la afero daŭras. (“*The Source and Remedy of the National Difficulties*” [, p. 4].)

{Same kiel kun la evoluo de la granda industrio la bazo, sur kiu ĝi troviĝas – alproprigo de fremda labor-tempo – ĉesas esti aŭ krei la riĉaĵon, tiel kun ĝi la rekta laboro kiel tia ĉesas esti la bazo de la

[p. 605]

produktado, per tio ke ĝi unuflanke estas transformata en pli superrigardan kaj reguligadan agadon, sed krome ankaŭ, ĉar la produkto ĉesas esti produkto de la unuopa senpera laboro, kaj pli ĝuste la *kombinaĵo* de la socia agado aperas kiel la produktanto.

“Ekde kiam labordivido estas disvolvita, [tiam -vl] preskaŭ ĉiu laboro de unuopa individuo estas parto de io tuta, kiu por si sola estas senvalora aŭ senutila. Ekzistas nenio, kion la laboristo povus alproprigi al si kaj diri: “Tio estas mia produkto, tion mi volas konservi por mi.” (“Labour defended”, 1,2,XL.)⁴³ [Thomas

43 [313] Markso ĉi tie citas el la anonima verko de Thomas Hodgskin: “Labour defended against the claims of capital .”,

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

Hodgskins (anonima): Labour defended against the claims of capital; or, the unproductiveness of capital proved. With reference to the present combination amongst journeyman. By a labourer, London 1825, p. 25. – angla ekonomikisto kaj publicisto, utopia socialisto; maldekstra rikardano]

En la rekta interŝanĝo la unuopa senpera laboro aperas kiel realigita en aparta produkto aŭ parto de la produkto kaj ĝia komuna socia karaktero – ĝia karaktero kiel konkretigo de la ĝenerala laboro kaj kontentigo de la ĝenerala bezono – nur metita per la interŝanĝo. Male en la produktadprocezo de la granda industrio, kiel unuflanke en la produktadforto de la laborrimedo disvolvita al aŭtomata procezo la submeto de la naturfortoj sub la socian inteligenton estas antaŭkondiĉo, tiel aliflanke la laboro de la unuopulo en sia [de la laboro -vl] senpera ekzistado estas metita kiel aŭfhebita⁴⁴ unuopa, t.e. kiel socia laboro. Tiel la alia bazo de tiu ĉi produktadmaniero forfalas.}

La labortempo aplikata por produktado de fiksa kapitalo rilatas ene de la produktadprocezo de la kapitalo mem al tiu aplikata por produktado de cirkulanta kapitalo kiel *pluslabora tempo al necesa*. Tiom, kiom la produktado direktita al kontentigo de la rekta bezono estas pli produk-

Londono, 1825, p. 25. -mew

44 Pri *aŭfhebi* vidu la piednoton 15 sur p. 22. -vl

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

tiva, pli granda parto de la produktado direkteblas al kontentigo de la produktadbezono mem aŭ al produktado de produktadrimedoj. Tiom, kiom la produktado de fiksa kapitalo ankaŭ laŭ la materiala flanko estas direktita ne al produktado de rektaj uzvaloroj nek al la produktado de valoroj, kiuj necesas por rekta reproduktado de la kapitalo – do kiu en la valorestigo mem ree reprezentas la uzvaloron – sed al la produktado de rimedoj por valorestigo, do ne al la valoro kiel senpera objekto, sed al la valorestigo, la rimedoj por plivalorigo kiel senpera objekto de la produktado – la produktado de valoro materie metita en la objekton de la produktado mem kiel celo de la produktado, de la konkretigo de produktivforto, valoron produktanta forto de la kapitalo – ĝi estas en la produktado de la *fiksa kapitalo* [tiel -vl], ke la kapitalo en pli alta potenco ol en la produktado de cirkulanta kapitalo metas sin kiel memcelon kaj aperas efika kiel kapitalo. Laŭ tiu flanko pro tio ankaŭ

[p. 606]

la dimensio, kiun la fiksa kapitalo jam posedas kaj kiu okupas ĝian produktadon en la ĉioma produktado, estas *mezurilo de la evoluo* de la riĉaĵo bazita sur la produktadmaniero de la kapitalo.

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

“La nombro de la laboristoj dependas tiom de la cirkulanta kapitalo, kiom ĝi dependas de la kvanto de la produktoj de la kunekzistanta laboro, kiujn la laboristoj rajtas konsumi.” (“Labour defended” [, p. 20].)

La teksteroj supre cititaj el diversaj fontoj ĉiuj rilatas al la fiksa kapitalo kiel tiu parto de la kapitalo, kiu estas enfermita en la produktadprocezo.

“Cirkulanta kapitalo estas konsumata, fiksa kapitalo nur aplikata en la granda procezo de la produktado.” (“Economist”, VI.1.)⁴⁵

Tio ĉi malĝustas kaj validas nur pri tiu parto de la cirkulanta kapitalo, kiu estas mem konsumata de la fiksa kapitalo, de la helpmaterialoj. Konsumata en la “granda procezo de produktado”, rigardata kiel rekta produktadprocezo, estas nur la *fiksa kapitalo*. Sed la konsumado ene de la produktadprocezo estas en la realo: *foruzi*. Krome, la *pli granda daŭremo* de la *fiksa kapitalo* estas komprenenda ankaŭ pure materiale. Fero kaj ligno, el kiuj konsistas la lito, en kiu mi dormas, aŭ la ŝtonoj, el kiu la domo konsistas, en kiu mi loĝas, aŭ la marmora statuo, per kiu palaco estas ornamata, estas same daŭremaj kiel fero kaj ligno ktp, kiuj estas uzataj por maŝinaro. Sed *daŭremo* ĉe instru-

45 [306] “Fixes and floating capital”, en “The Economist” (Londono) dela 6-a de Novembro 1847. Markso referencas sian londonan ekscerpto-kajeron VI de 1851. -mew

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

mento, ĉe produktadrimedo estas kondiĉo, ne nur pro la teĥnika kialo, ĉar metaloj ktp estas la ĉefa materialo de ĉia maŝinaro, sed ĉar la instrumento estas destinita ludi la saman rolon konstante en adaj produktadprocezoj. Kiel produktadrimedo ĝia daŭremo estas postulata rekte per ĝia uzvaloro. Ju pli ofte ĝi estus anstataŭigenda, des pli multekosta ĝi estus; des pli granda parto de la kapitalo estus aplikenda al ĝi senutile. Ĝia daŭro estas ĝia ekzisto kiel produktadrimedo. Ĝia daŭro estas pliigo de ĝia produktadforto. Ĉe la cirkulanta kapitalo, male, tiom kiom ĝi ne estas transformata en fiksan kapitalon, la daŭremo tute ne rilatas kun la produktadprocezo mem kaj do ne estas nocie metita elemento. La fakto, ke inter la objektoj ĵetitaj en la konsum-fonduson kelkaj, ĉar ili estas konsumataj malrapide kaj de multaj individuoj konsumeblaj laŭvice unu post la alia, estas determinataj kiel fiksa kapitalo, rilatas kun kromaj punktoj (luado anstataŭ vendado, interezo ktp) pri kiuj ni ĉi tie ankoraŭ ne okupiĝas.

[p. 607]

“Ekde la ĝenerala enkonduko de senanimaj meĥanismoj en britaj manufakturoj, homoj kun malmultaj esceptoj estis traktataj kiel duaranga kaj subordigita maŝino kaj oni dediĉas multe pli da atento al perfektigo de la krudmaterialo el ligno kaj metaloj ol al tiuj de korpo kaj

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

spirito.” (p. 31. Robert Owen: “Essays on the formation of the human character”, 1840. Londono.)

{La reala ekonomio – ŝparado – konsistas el ŝparado de labortempo; (minimumo (kaj reduktado al minimumo) de la produktadkostoj); sed tiu ŝparo identas kun la evoluo de la produktadforto. Do tute ne rezigno je ĝuado, sed disvolvado de forto, de kapabloj por produktado kaj pro tio same de la kapabloj kiel de la rimedoj de la ĝuado. La kapablo de la ĝuado estas premiso por ĝi, do unua rimedo de ĝi, kaj tiu kapablo estas evoluo de individua talento, produktadforto. La ŝparo de labortempo egalas al pliigo de la libera tempo, t.e. tempo por la plena disvolvado de la individuo, kiu siavice mem kiel la plej granda produktadforto reefikas al la produktadforto de la laboro. El la starpunkto de la rekta produktadprocezo ĝi rigardeblas kiel produktado de fiksa kapitalo; tiu fiksa kapitalo estas la homo mem. Cetere, ke la rekta labortempo mem ne povas resti en la abstrakta kontraŭeco al la libera tempo – kiel tio aperas el la starpunkto de la burĝaj ekonomikistoj –, tio estas memkomprenebla. La laboro ne povas fariĝi ludo, kiel Furiero⁴⁶ volas [p. 245-252], al kiu restas la granda merito ke li

46 Furiero (François Charles Fourier, 1772 – 1837) – franca utopia socialisto. “En Furiero ni renkontas akran kritikon, aŭtente francan, sed pro tio ne malpli tranĉan, de la ekzistantaj sociaj institucioj. Li senkompate nudigas la materia kaj moralan mizeron de la burĝa mondo.” (Engelso) -mew

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

eldiris la aŭfhebon⁴⁷ ne de la distribuado, sed de la produktadmaniero mem en pli altan formon kiel lastan celon. La libera tempo, kiu estas same tempo de nenifarado kiel tempo por pli alta aktiveco – kompreneble transformis sian posedanton en alian subjekton, kaj kiel tiu ĉi alia subjekto li tiam ankaŭ enpaŝas en la rektan produktadprocezon. Tiu ĉi estas samtempe disciplino, konsiderata kun rilato al la estiĝanta homo, kiel praktikado, eksperimenta scienco, materie krea kaj konkretiĝanta scienco kun rilato al la fariĝinta homo, en kies kapo la akumulita scio de la socio ekzistas. Por ambaŭ, tiom kiom la laboro postulas praktik-an intervenon kaj liberan moviĝon, kiel en la kampkulturo⁴⁸, ĝi estas samtempe ekzercado.

Kiel nur iom post iom la sistemo de la burĝa ekonomio al ni disvolviĝas, tiel ankaŭ la negado de ĝi mem, kiu estas ĝia lasta rezulto. Ni nun ankoraŭ rilatas kun la rekta produktadprocezo.

[p. 608]

Se ni rigardas la burĝan socion en ĝia tuteco, tiam ĉiam kiel lasta rezulto de la socia produktadprocezo aperas la socio mem, t.e. la homo mem en siaj sociaj rilatoj. Ĉio, kio

47 Nuligon kaj samtempe konservadon sur pli alta nivelo. Vidu la piednoton 15 sur p. 22. -vl

48 Ankaŭ nomata *agrikulturo* aŭ *terkulturo* (ambaŭ ne oficialaj terminoj, dum *kampkulturo*, same kiel *terkulturo*, konsistas el fundamentaj vortoj. -vl

Karlo Markso: La tiel nomata Fragmento pri maŝinoj

havas firman formon, kiel produkto ktp, aperas nur kiel momento, malaperanta momento en tiu moviĝo. La rekta produktadprocezo mem aperas ĉi tie nur kiel momento⁴⁹. La kondiĉoj kaj la konkretigoj de la procezo estas mem egale momentoj de ĝi, kaj kiel ĝiaj subjektoj aperas nur la individuoj, sed la individuoj en interrilato, kiun ili same reproduktas kiel nove produktas. Ilia propra moviĝprocezo, en kiu ili same multe reproduktas sin kiel la mondon de la riĉaĵo, kiun ili kreas.}

(En siaj “Six lectures delivered at Manchester. 1837” Owen parolas pri la diferenco, kiun la kapitalo jam pro sia kreskado (kaj larĝa apero, kaj tiun ĉi ĝi ricevas nur en la granda, kun la evoluo de la fiksa kapitalo rilatanta industrio) kreas inter laboristoj kaj kapitalistoj; sed li eldiras la disvolvadon de la kapitalo kiel *necesan kondiĉon* por la rekreado de la socio kaj rakontas pri si mem:

“Sekve al la iom-post-ioma progresanta instruado necesis krei kaj gvidi iujn el tiuj grandaj fabrikaj instalaĵoj, ke ilia preleganto (Owen mem) estis klera por kompreni la grandajn erarojn kaj malavantaĝojn de la pasintaj kaj nuntempaj provoj plibonigi la karakteron kaj la situacion de siaj kunhomoj.”
(p. 58)

49 Mi ree atentigu, ke *momento* kaj *elemento* en la germana en tiutempaj filozofiaj tekstoj estas esprimataj de la sama vorto *Moment*. -vl

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

Ni citas ĉi tie la tutan teksteron, por uzi ĝin ĉe alia okazo.

“La produktantoj de la elformita riĉaĵo dividblas en laboristojn en molaj kaj laboristojn en malmolaj materialoj, sub la rekta gvidado, ĝenerale de mastroj⁵⁰, kies tasko estas fari mongajnon per la laboro de tiuj, kiujn ili aplikas⁵¹. Antaŭ la enkonduko de la ĥemia kaj meĥanika manufaktursistemo operacioj estis farataj sur limigita skalo; ekzistis multaj malgrandaj majstroj, ĉiu kun kelkaj malmultaj taglaboristoj, kiuj en deca tempo esperis ankaŭ fariĝi malgrandaj majstroj. Ili kutime manĝis ĉe la sama tablo kaj vivis kune; inter ili regis spirito kaj sento de sameco. Ekde la periodo, kiam la forto de la scienco komencis esti pli aŭ malpli ĝenerale aplikata al la manufakturo, laŭgrada ŝanĝo tiurilate etendiĝis. Preskaŭ ĉiuj manufakturoj, por sukcesi, devas nun esti gvidataj malintense kaj kun granda kapitalo; malgrandaj majstroj kun malgrandaj kapitaloj nun havas nur malmultajn ŝancojn sukcesi, nome en la manufakturoj, en kiuj molaj materialoj, kiel koton, lano, lino ktp [estas prilaborataj -vl]; nun efektive estas evidenta

50 En la germanlingva citaĵo: Meister = majstro; en la tradicia metio la majstro estis samtempe la mastro de la entrepreneto. -vl

51 En la senco de *laborigas*. -vl

[p. 609]

ke, se la nuna klasifiko de la socio kaj maniero de gvidado de la komerca vivo daŭros, la malgrandaj mastroj estas pli kaj pli anstataŭataj de tiuj, kiuj posedas grandajn kapitalojn, kaj ke la unua relative pli feliĉa egaleco inter la produktantoj devas cedi al la plej granda malegaleco inter mastro kaj laboristo, tiel kiel ĝi neniam okazis en la historio de la homaro. La granda kapitalisto estas nun levita al la pozicio de ordona lordo, kiu traktas sanon, vivon kaj morton de siaj sklavoj rekte kiel li volas. Tiun povon li ricevas per la kombinado kun aliaj grandaj kapitalistoj, engaĝiĝintaj en la sama intereso kun li mem, kaj tiel efike devigas laŭ siaj intencoj tiujn, kiujn li aplikas. La granda kapitalisto naĝas en riĉaĵo, kies ĝustan uzadon oni ne instruis al li kaj kiun li ne konas. Li akiris potencon per sia riĉaĵo. Lia riĉaĵo kaj lia potenco blindigas lian menson; kaj kiam li tute dolorige subpremas, li kredas fari favoron ... Liaj servis-toj, kiel ili ĉiam estas nomataj, liaj sklavoj en la realo, estas reduktitaj al plej senespera degradiĝo; ilia plimulto estas prirabita je sia sano, je hejma komforto, je libertempo kaj sanaj liberaeraj plezuroj de antaŭaj tagoj. Per troa elĉerpiĝo de iliaj fortoj, estigita de longe tenataj unutonaj okupadoj, ili estas delogataj al kutimoj de senmezureco kaj fariĝas mallertaj por pensado aŭ cerbumado. Ili ne povas havi korpajn, intelek-

[Fiksa kapitalo kaj disvolvado de la produktadfortoj de la socio]

tajn aŭ moralajn amuziĝojn escepte de la plej malbona speco; ĉiuj realaj amuziĝoj de la vivo estas tre malproksimaj de ili. La ekzistado, kiun tre granda parto de la laboristoj sub la nuna sistemo vivas, per unu vorto ne valoras esti posedata.

Sed pri la ŝanĝoj, de kiuj ĉi tio estas la rezultoj, mallaŭdendas ne individuoj; *ili okazas en la regula ordo de la naturo kaj estas preparaj kaj necesaj ŝtupoj al la granda kaj grava socia revolucio, kiu estas progresanta*. Sen grandaj kapitaloj ne eblas fondi grandajn instalaĵojn; ne eblas instigi homojn kompreni la eblecon alkonduki novajn kombinaĵojn por certigi al ĉiuj pli altan karakteron kaj la produktadon de pli da ĉiujara riĉaĵo ol ĉiuj povas konsumi; kaj ke la riĉaĵo ankaŭ devas esti de pli alta speco ol la ĝis nun ĝenerale produktata.” (l.c., p. 56s)

“Tiu estas la nova ĥemia kaj meĥanika manufaktursistemo, kiu nun pli ampleksigas la homajn kapablojn kaj preparas ilin kompreni aliajn principojn kaj praktikojn, adopti ilin kaj tiel fari la bonfaran ŝanĝon en la aferoj, kiun la mondo ankoraŭ spertis. Kaj tiu ĉi nova manufaktursistemo estas tiu, kiu nun kreas la neceson por alia kaj pli alta klasifiko de la socio.” (l.c., p. 58.)

Citaĵo pri la cifereca evoluo

[...]

La cifereca mondo lastanalize bezonas klerigpolitikan *New Deal*, se ĝi ne rompiĝu ĉe sia propra sukceso. Laŭ aktuala studaĵo de la Monda Ekonomia Forumo (World Economic Forum, WEF) ĝis la jaro 2025 la laboro farata de maŝinoj kreskos de nun 29 elcentoj al pli ol 50 elcentoj.

La Tutmonda Instituto McKinsey taksas, ke proksimume tridek ĝis sesdek elcentoj de la laborlokoj komplete aŭtomatigeblas. Sistemoj de artefarita inteligento ĉiam pli kapablas lerni plenumi komplikajn intelektajn taskojn, ekzemple la ekkonon de kompleksaj modeloj, la sintezigon de informoj, la konkludadon kaj la starigon de prognozoj.

Por homa laboro ja ĉiam restos spaco, kaj personaj servoj nur en limigita kvanto anstataŭeblas de maŝinoj. La jam nun observebla procezo de socia fragmentiĝo okazanta pro ennovigoj tamen akiros novan viklecon kaj en meza perspektivo minacas disŝiri la socian kunteniĝon.

[...]

*Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano el:
Tagesspiegel, 2020-07-28:
<https://www.tagesspiegel.de/politik/code-is-law-warum-europa-dringed-digital-souveraen-werden-muss/26044380.html>*

La Monda Asembleo Socia (MAS) kaj ĝiaj libroj

La MAS estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.mondediplo.com>) – reta, laŭokaze ankaŭ papera – volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ mem verkitajn de la membroj. Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS.

Ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj, i.a. ĉar la enspezojn per venditaj libroj MAS uzas por eldoni novajn. Montriĝis, ke verkado, tradukado kaj eldonado de libroj fariĝis la ĉefa agado de la MAS-anoj. Vidu jen la ĝis nun eldonitajn titolojn en la vico de ilia apero:

1. – C. F. Ramuz: Aline (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-0-2 (elĉerpita, **2-a eldono vidu n-ron 127**)

2. – **Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo)**, kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-2-6

3. – Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 59 p., ISBN 978-2-9529537-1-9 (elĉerpita, **2-a eld. sub 159**)

4. – **Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, MAS, (2007, 120 p.), 2-a eld. 2017, 118 p., ISBN 978-2-9529537-088-6

5. – GBEGLO Koffi: Esperantujismo, MAS, 2008, 72 p., ISBN 978-2-9529537-5-7 (elĉerpita, vd la **2-an eldonon sub n-ro 171**)

6. – **Johano Besada: Eseoj**, MAS, 2008, 92 p., ISBN 978-2-9529537-3-3

7. – [Karlo Markso] Markso hodiaŭ -- Nerefuteblaj citaĵoj, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2008, p. 91 p., ISBN 978-2-9529537-8-8 (elĉerpita, **vd la 3-an eld. MAS-253**)

La Monda Asembleo Socia (MAS) kaj ĝiaj libroj

8. – Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj (2 paroladoj), elhispanigita de Amparado Cisnero, MAS, 2009, 84 p., ISBN 978-2-9529537-7-1

9. – Dominique Vidal kun Sébastien Boussois: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn 1947-1949, elfrancisigis Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 361 p., ISBN 978-2-9529 537-6-4

10. – Unuiĝintaj Nacioj: Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj – trad. de Vilhelmo Lu-termano, MAS, 2009, 230 p., ISBN 978-2-9529537-9-5

11. – Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-00-7 (elĉerpita; vidu **2-an eld. MAS 236**)

12. – Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 52 p., ISBN 978-2-918300-02-1

13. – Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-03-8 (2-a eld.: 978-2-918300-21-2)

14. – Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo, MAS, 2009, 103 p., ISBN 978-2-918300-05-2

15. – Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio. Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 112 p., ISBN 978-2-918300-04-5

16. – Kien Ĉinio? Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj. François Jullien: Ĉinscienco en sakstrato – Ĉinio en la spegulo de Okcidento; Manfred Szameitat: Sukcesa, sed ne socialisma; Ingo Nentwig: Naciaj malplimultoj kaj politiko pri naciaj malplimultoj en la PR Ĉinio; Barry Sautman: Protestoj kaj separismo en Tibeto; Michael Parenti: La mito de Tibeto; Enfu Cheng: Fundamentaj trajtoj de la socialisma merkatekonomio; Jian Xinhua: Harmonia socio, salajrolaboro kaj klasbataloj; Theodor Bergmann: La socialisma disvolvo-strategio de la PR Ĉinio; Rolf Berthold: Pri la interna kaj eksterapolitiko de la KP de Ĉinio; Li Bingyan: Ĉinio sub influo de la novliberalismo; Helmut Peters: Popolrespubliko Ĉinio: 30 jaroj da reform-kaj malferm-politiko; Jean-Louis Rocca: Ĉu la ĉina meza klaso estas revolucia? Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 142 p., ISBN 978-2-918300-06-9

La Monda Asembleo Socia (MAS) kaj ĝiaj libroj

17. – Karlo Markso: La mizero de la filozofio, respondo al J. B. Prudono: “La filozofio de la mizero”; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; Pri J. B. Prudono. Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 196 p., ISBN 978-2-918300-08-3

18. – Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1, Jörg Goldberg: La historia pozicio de la nuna ekonomia krizo – pli da demandoj ol respondoj, Horst Hensel: La nomoj de la mono – kontribuado al karakterizo de la nuna kapitalismo, Harald Werner: Notoj pri la psihologio de la krizo, Sarah Wagenknecht: Brulfaristoj kiel fajrobrigado – Kritiko de la krizmastrumado, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 57 p., ISBN 978-2-918300-09-0

19. – Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo – La Kuba Kvinopo, Howard Zinn: La radikoj de la politiko de Usono rilate Kubon, Noam Chomsky: Kubo kaj Usono – preskaŭ duonjarcento da teroro, William Blum: La nepardonebla revolucio, Michael Parenti: Agresso kaj propagando kontraŭ Kubo, Piero Glejeses: Kubo, Afriko kaj la kvin kubanoj, Ignacio Ramonet: Miamo, nesto de teroristoj, Salim Lamrani: La Kuba-Usona Nacia Fondaĵo (KUNF) kaj la internacia terorismo, Leonard Weinglass : La proceso kontraŭ la Kuba Kvinopo, Wayne Smith: Trista paĝo en la historio de usona juro, Saul Landau: Kvin kubanoj en malliberejo: viktimoj de la obsedo de Bush, Michael S. Smith: Raporto pri du procesoj, James Petras: La Kvin Kubanoj – kandidatoj por la Nobel-premio, Jitendra Sharma: Veraj batalantoj kontraŭ terorismo, Rikardo Alarcón de Quesada: La kazo de la Kvin – pruvo de la terorismo de Usono kontraŭ Kubo, Gianni Miná: Historio kiun la amaskomunikiloj kaŝas – la kvin kubanoj, Nadine Gordimer: La homaro kiel reflektado de la justeco, tradukoj de div. MAS-anoj, MAS, 2009 tradukoj de div. MAS-anoj, 2009, 232 p., ISBN 978-2-918300-10-6

20. – Elisée BYELONGO IŜELOKE: Eĥoj el Bembujo. Tradicio, rilatoj kun Banyamulenge, la genezo de la milito en Kongolando-Kinŝaso, kaj la diasporo rilate al Esperanto, MAS, 2009, 91 p., ISBN 978-2-918300-11-3

21. – Oktobra Revolucio kaj la sekvoj. Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovetosocio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 48 p., ISBN 978-2-918300-07-6

22. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2, Joachim Bischoff: La financkrizo kaj alternativoj, Andreas Fisahn: Demokratia stirado de la ekonomio, Manfred Sohn: Dek tezoj por sociigo de la cirkuladsfero, Luciano C. Martorano: Socialismo, sociigo, demokratio, Manfred Laueremann: La dialektika plan-ekonomio de Ĉinio – respondo al la financkrizo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 81 p., ISBN 978-2-918300-12-0

La Monda Asembleo Socia (MAS) kaj ĝiaj libroj

23. – La homo kaj lia naturo – La bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj. Lucien Sève: Ĉu la homo? – La marka antropologio kaj ĝiaj bazaj konceptoj, Werner Seppmann: Mond- kaj hom-bildoj – Pri la formoj de ideologiaj potenceproduktado, Helga E. Hörz: Ĉu la hombildo krizas? Hans-Peter Brenner: Biopsiŝosocia unuo homo – kognia cerbesplorado kaj ties impulsoj por la marksisma hombildo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 72 p., ISBN 978-2-918300-15-1

24. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj unua ĝis naŭa, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 381 p., ISBN 978-2-918300-13-7 (elĉerpita; **vd la 3-an eld. n-ro 166**)

25. Karlo Markso; Frederiko Engelo: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 62 p., ISBN 978-2-918300-17-5

26. – Frederiko Engelo: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 204 p., ISBN 978-2-918300-16-8

27. – Arnold Petersen: Komentoj al la “Komunista Manifesto”, tradukis el la angla kaj kompilis T. Veder, (reviziita reeldono de la sama, S.A.T., Parizo 1933), MAS, 2010, 49 p., ISBN 978-2-918300-19-9

28. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 3 (2010), Werner Seppmann: Riskokapitalismo;, Richard Sorg: Domenico Losurdo interpretas Niĉeon;, Christina Kaindl: Subjektiveco en la krizo; Harald Werner: La krizo en la ordinara konscio; Christoph Butterwegge: Mondekonomia krizo, evoluo de la socialŝtato kaj malriĉeco, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p., ISBN 978-2-918300-22-9

29. – Werner Seppman: Laboro kaj dialektiko – Pri la emancip-horizonto de la Marksa pensado; Harald Neubert: La “historia misio de la laborista klaso” ĉe Markso kaj Engelo kaj la historia realeco; Hans Kōlsch: Kubo – Heinz Dieterich – kontraŭeeco; Otto Meyer: Teologio de liberigo – ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo? Eseoĝ elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 79 p., ISBN 978-2-918300-18-2

30. – Adjévi ADJE: El togolanda saĝosako, MAS, 2010, 56 p., ISBN 978-2-918300 20-5

31. – Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-25-0 (nur rete; **vd la presitan libron n-ro 67**)

La Monda Asembleo Socia (MAS) kaj ĝiaj libroj

32. – Ivan Efremov: La nebulozo de Andromedo, Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 403 p., ISBN 978-2-918300-24-3

33. – Domenico Losurdo: Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucioj hodiaŭ, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 199 p., ISBN 978-2-918300-26-7

34. – Maritza Gutiérrez: José Martí – de kie kreskas la palmo, MAS, 2010, 54 p., ISBN 978-2-918300-28-1 (1-a eld., elĉerp., **vd 34a**)

34a. – Maritza Gutiérrez: José Martí – de kie kreskas la palmo, MAS, 2016, 66 p., ISBN 978-2-36960-068-8 (2-a eld.)

35. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj deka ĝis dektria, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 243 p., ISBN 978-2-918300-14-4 (elĉerpita, **vd la 3-an eld. n-ron 166**)

36. – Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Koĉabambo, Eseoj kaj raportoj, Alexis Passadakis kaj Hendrik Sander: Konkurenco en la forcejo Klimatpolitikaj perspektivoj post la fiasko de Kopenhago; Hans-Jörg Schimmel: La ideologia dimensio de la CO₂-diskuto; Karl Hermann Tjaden: Kapitalmoviĝo kaj klimata okazaĵo; raportoj, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 59 p., ISBN 978-2-918300-31-1

37. – Georgo Pleĥanov: Pri rolo de la persono en la historio, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 59 p., ISBN 978-2-918300-36-6.

38. – Karlo Markso: Pri la juda demando, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 49 p., ISBN 978-2-918300-29-8

39. – Eddy Raats: Post la pluvo, pluvego, Travivaĵoj de junulo, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-34-2

40. – Adebayo AFOLARANMI: Ronke, la ĵaluzulino, MAS, 2010, 85 p., ISBN 978-2-918300-35-9

41. – Jozefo Ŝlejŝtejno: Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, (1-a eld. 2010, 271 p., ISBN 978-2-918300-27-4) 2-a eldono 2016, 282 p. ISBN 978-2-36960-050-3

42. – Ivan Efremov: La Horo de Bovo. Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 573 p., ISBN 978-2-918300-37-3

43. – Roger Martelli: La komunismo estas bona partio – diru al ĝi JES, elfrancigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, (1-a eld. 2010, 80 p.), 2-a eld. 2017, 96 p., ISBN 978-2-918300-36-6

La Monda Asembleo Socia (MAS) kaj ĝiaj libroj

44. – Karlo Markso: Kontribuajo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko; Kontribuajo al la kritiko de la politika ekonomio. Antaŭparolo. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 36 p., ISBN 978-2-918300-38-0

45. – Miriam Rodríguez; ALVERA: Desegni la parkon, elhispanigis Jozefo de Jesús Campos Pacheco (porinfana pentrolibro), 28 p., ISBN 978-2-918300-23-6

46. – Kien Afriko en la 21-a jarcento? Le Monde diplomatique en Esperanto, MAS, 2010, 157 p., ISBN 978-2-918300-39-7

47. – Paŭlo Popo: Ĉu sekso subfosas? Maldekstraj teorioj de seksa liberiĝo kaj de malkonstruo de seksa identeco. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p., ISBN 978-2-918300-41-0

48. – Ŝtejgervaldo, Roberto: Komunistaj star- kaj disput-punktoj, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 151 p., ISBN 978-2-918300-40-3

49. – Jürgen Albohn: Teorio sen revolucia praktiko estas opio por la popolo – Kritiko de la Wertkritik. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 27 p., ISBN 978-2-918300-42-7

50. – V. I. Lenin: Ŝtato kaj revolucio. La instruo de la marksismo pri la ŝtato kaj taskoj de la proletaro en revolucio. Tradukis el la rusa G. Demidjuk, redaktis Jurij Finkel, MAS, 2011, 181 p., ISBN 978-2-918300-43-4

51. – Unuiĝintaj Nacioj: Internacia Konvencio pri la protekto de la rajtoj de ĉiuj migraj laboristoj kaj de iliaj familianoj. Tradukita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-44-1

52. – Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer (1923), Arturo Baker (1908), (T. Veder 1933) kaj la germana originalo, komp. Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 289 p., ISBN 978-2-918300-45-8 (elĉerpita. Vd la novan eldonon (kvar-resp. kvin-versian) de 2017 sub la **MAS-numero 178**)

53. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina , Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 359 p., ISBN 978-2-918300-30-4 (elĉerpita; vd la **3-an eld. n-ro 166**)

54. Gvidlibreto por kompreni la internaciajn migradojn, tradukita de Jeanne Marie Cash, desegnaĵoj de la tradukinto, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 15 p., ISBN 978-2-918300-47-2

La Monda Asembleo Socia (MAS) kaj ĝiaj libroj

55. **Miriam Rodríguez: Profiloj de Suno kaj Luno**, elhispanigita de Jozefo de Jesús Campos Pacheco, kun desegnaĵoj de Danny Daniel Perera Gutiérrez, MAS, 2011, 30 p., ISBN 978-2-918300-46-5

56. **Frederiko Engelso: Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300-48-9

57. **Georgo Dimitrofo: Raporto al la 7-a Kongreso de la Komunista Internacio; Harald Neubert: La Kominterno en la 1930-aj jaroj kaj la koncepto de unueco;** kun enkonduko de Günther Judick, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 113 p., ISBN 978-2-918300-49-6

58. **José María Arguedas: Yawar-festo (Sangofesto)**, Esperantigita de Franklin Montenegro, MAS, 2011, 256 p., ISBN 978-2-918300-51-9

59. **Ekonomia krizo n-ro 4.** Joachim Becker: EU – de la ekonomia al la integriĝa krizo. Jörg Goldberg: La mondo de la du rapidoj. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-52-6

60. **Frederiko Engelso en aktualaj diskutoj.** Werner Seppmann: Privilegia loko por rigardi en la laborejon de la marksisma pensado. Notoj pri la korespondado inter Markso kaj Engelso; Erwin Marquit: Engelso kaj logikaj kontraŭdiroj; Karl Hermann Tjaden: Kial ne estiĝis vera engelsismo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 35 p., ISBN 978-2-918300-50-2

61. **V. I. Lenino: Tri fontoj kaj tri partoj de la marksismo; Anarĥiismo kaj socialismo; Pri la slogano de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo; La oportunismo kaj la kolapso de la 2-a internacio; La diferencoj en la eŭropa laborista movado; Antaŭparolo al la broŝuro de N. Buĥarin: “Mondekonomio kaj imperiismo”;** elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 40 p., ISBN 978-2-918300-53-3

62. **Daŭrigo de la Manifesto, Moderna poziciigo de komunista partio, La programo de la Germana Komunista Partio DKP, kun antaŭparolo de Helmut Dunkhase,** elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 63 p., ISBN 978-2-918300-54-0

63. **Lode Van de Velde: Epizodoj,** MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300-55-7

64. **Jasuo HORI: Tertrema katastrofo de Japanio. Taglibro,** MAS kaj SAT, 2011, 165 p., ISBN 978-2-918300-56-4

65. **Werner Seppmann: La malkonfesata klaso.. Pri la laborista klaso hodiaŭ,** elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 176 p., ISBN 978-2-918300-57-1

La Monda Asembleo Socia (MAS) kaj ĝiaj libroj

66. Roberto Ŝteĝervaldo: Sen laborista klaso okazas nenio esenca, sed sole kun ĝi – ankaŭ ne; Werner Seppmann: Remalkovro de la klasoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 35 paĝoj, ISBN 978-2-918300-58-8

67. Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-60-1

68. Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-59-5 (vd la **3-an eldonon, n-ro 166**)

69. Kien la klimato? N-ro 2, MAS, 2011, 61 p., ISBN 978-2-918300-61-8

70. Berto Breĥto: Historioj pri S-ro Kojno, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 43 p., ISBN 978-2-918300-62-5 (kiel materialo por seminario ĉe MAS)

71. Ivan Efremov: Rakontoj pri neordinaraĵoj, tradukitaj el la rusa de Jurij Finkel, MAS, 2011, 604 p., ISBN 978-2-918300-63-2

72. Alfredo Bauer: Kritika historio de la judoj, vol. 1, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 459 p., ISBN 978-2-918300-64-9

73. Karlo Markso: Respondo al V. I. Sasuliĉ, kun Klaus Gietinger: La miskompreno, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 59 p., ISBN 978-2-918300-71-7

74. Frederiko Engelso: La evoluo de la socialismo de utopio al scienco, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 65 p., ISBN 978-2-918300-65-6

75. Georgo Fulberto: „La kapitalo” koncize. Kun recenzo de Lucas Zeise. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 98 p., ISBN 978-2-918300-72-4

76. Ivan Efremov: Tais el Ateno. El la rusa tradukis Jurij Finkel. MAS, 2012, 533 p., ISBN 978-2-918300-73-1

